

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FR. AU 1'50 USONAJ DOLAROJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN BARCELONA

Redaktoroj: S. Alberich-Jofrè, Delfí Dalmau, Isidre Torrents

Les llengües internacionals "naturals"

Lord Grey en el seu llibre suara editat «Twenty Five Years (Vint-i-cinc Anys) 1892-916, dóna curiosos detalls de dificultats lingüístiques en les conferències diplomàtiques de París: Mr. Asquith, Mr. Lloyd George i ell hagueren d'anar a una d'aquelles conferències, en la qual calia emprar el francès. — Asquith no *volgué*, Lloyd George no *pogué*, ell (Grey), doncs, *hagué* de parlar en francès, malgrat del seu accent estrany, vocabulari limitat i gramàtica deficient». Quan el Consell fou acabat, i tots havien sortit, Lloyd George va dir a Lord Grey: «El vostre francès ha estat l'únic francès que he pogut comprendre».

LES UTOPIES D'AHIR

No perquè una cosa no hagi estat realitzada és utòpica. O bé caldrà dir que tot projecte d'innovació és utòpic. D'altra banda, el nom d'utopia sovint amaga la manca d'informació. Ara fa cent anys una doctíssima Acadèmica del Continent declarava impossible — per raons científiques, no per apriorismes — la tracció a vapor... quan a Anglaterra ja esbufegaven les locomotores.

LL. NICOLAU D'OLWER

De nia proksima numero,

KATALUNA ESPERANTISTO,

krom literaturaj verkaĵoj premiitaj, publikigos tre interesan kaj profundan studon de

P. S T O J A N,

la eminenta Universitata profesoro pri Esperanto dum la
Ĝeneva Kongreso, pri la

PRINCIPOJ DE ESPERANTO

Por akuratigo de KORESPONDAĴO al nia Federacio kaj al nia gazeto, bonvolu ĝin sendi al la jena adreso:

Carrer València, núm. 245 — Barcelona

Bonvole akceptos bonajn elkatalunajn enesperantajn verkaĵojn, la jenaj esperantaj gazetoj:

«**Amerika Esperantisto**», 507 Pierce Building, Copley Square,
Boston 17, (U. S. A.).

«**Belga Esperantisto**». 11 Hondstraat, *Antwerpen (Belgica).*

«**La Progreso**», Socharská, 333. *Praha VII (Txecoslovàquia).*



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gitaro*

Redakcio: Carrer València, 245 - BARCELONA

Pro... kaj Por...

MULTAJ ANEKDOTAJ ARGUMENTOJ DE PERSONOJ

Eminenta esperantisto proponas kaj eĉ ofertas por granda projekto favora al Esperanto, ĉu pri vortaro, aŭ propagando; li petas monrimedojn aŭ helplaboron: se li sukcesos, Esperanto estas kaj estos perfekta; se li ne ricevos sufiĉe da mono, kunlaboro aŭ laŭdo, iu ajn lingvistado por alia internacia lingvo prezentas pli bonan solvon ol Esperanto, ĉar pro neniu alia internacia lingvo, eĉ nur imaga, li ankoraŭ malsukcesis. Ankaŭ eminenta patrioto kiu atingis malsukceson pro sia patrujo kredas *ĝin* kulpa, ne *sin*. Kaj, kompreneble, li ne kredas kulpa alian landon en kiu aŭ pro kiu *li* ne havis okazon malsukcesi. Lingvo, lando, profesio, familio k. t. a. estas ĉiam kulpaj laŭ tiuj malgeniaj homoj kiuj volas *sin* kredi superaj. Tiel facila kaj dolĉa estas tiu kredado!

La Redakcio neniel respondas (sed nur la aŭtoroj aŭ tradukintoj) pri opinioj, neologismoj, kaj aliaj detaloj de artikoloj, k. t. p., en ĉi tiu gazeto.

DU UNIVERSALAJ ARGUMENTOJ DE ESPERANTO

Praktike, lingve pruviĝis Esperanto la vera, la granda solvo, eltrovo, ellaboro, originalo de Zamenhof. Dank'al la verko de la Majstro estas faritaj jam multaj lingvostudoj, el kiuj plej sprita kaj profunda estas tiu de Prof. Lingva Konsilisto Dro. log. kaj prec., Hans Wurstly-Arlequin, membro de A. Ĉ. O., A. D. O., A. Ĵ. O., A. N. O., A. R. O., Ĉ. J. O., E. B. L. O., ktp., klarigita de «La Orienta Revuo» el Tokio, aŭgusto 1925, subnomita «La Revuo Oriĝonta» por tiu numero. La granda eraro de multegaj homoj estas ke ili kulpigas aferojn anstataŭ siĝ, post malsukceso propra. La granda eraro de la aŭtoroj de tiuj lingvostudoj, estas ke ili sĝn kredas ne malpli ol geniaj kreintoj de *la* internacia lingvo. Kaj erarego de multaj esperantistoj estas timi ilin tiaj. Ni kaj ili povas ja vidi la universalan argumenton de Esperanto: ke praktike, lingve, la originalo de la Majstro pruviĝis *la solvo*.

Kaj, plie, kies lingvostudo havas *la animon*? *La interna ideo* naskiĝis kun Esperanto kaj Esperanto kun la interna ideo! Eĉ la «naturaj» lingvoj naskiĝis kun propra animo kaj dekadencas kaj mortas kiam dekadencas kaj mortas la propra animo. La interna ideo de Esperanto, t. e., la animo, la vivo, estas la alia universalaj argumento de Esperanto.

Kial ni timus?

Ĉiuj antaŭjuĝoj de lingvistoj kontraŭ Esperanto: ke la popoloj de malsamaj lingvoj komprenos kaj uzos internacian lingvon malsame, evidentiĝis senveraj, falsaj.

Ni simple bone komprenu ke ĉiuj aŭtoroj de lingvostudoj faritaj ĉu pro spontana esploro ĉu pro iu ajn anekdoto, estas aŭtoroj de monografioj, kelkaj eĉ tre bonaj, pri internacia lingvo faritaj dank' al Esperanto. Kaj ni konsciu ankaŭ ke niaj nur Lingvaj Institucioj rajtas pridiskuti kaj voĉdoni pri iu ajn lingva temo el iu ajn deveno, rilata al *la* internacia lingvo. Imponaj estu la du Universalaj argumentoj de Esperanto, kontraŭ ĉiuj anekdotaj argumentoj personaj.

FONETIKO KAJ GRAMATIKO

Mi estas certa ke neniam konfuziĝos fonetike *jen* kaj *ien*, ekz. Sed pro sama rezono mi ne estas certa ke ĉiam estos fonetike samvaloraj *ie* ĉe *maniero* (vojo, metodo) kaj ĉe *filozofiemo*, ekz. — Kial? — Plej multaj lingvoj en kiuj estas la vorto *maniero* havas por ties *ie* nur *e*. Kaj eĉ la franca, kies estas la formo *maniero*, diftongigas tiun *ie*. La «natura» internacia influo por tiu diftongigo estas fortega. Eĉ ŝajnas al tiu kiu volas dusilabigi *ie* ĉe *mani-ero*, ke li pensigas al aŭskultanto, pri kunmeto de radiko *mani(o)* kaj sufikso *er(o)*. Kontraŭe, sentigas klarigon pri la vera senco de *filozofiemo*, dusilabigo de ĝia *ie*.

Estas kelkaj fonetikaj aferoj kiel tiu, kiujn devas konsideri kaj almenaŭ prikonsili al la esperantistaro Komisiono pri Fonetiko el niaj Lingvaj Institucioj, ĉu por subteni bonan evoluon ĉu por eviti malbonan.

La precizigo kaj gvido de la *praktika* uzo de la prepozicioj ankaŭ prezentas tre interesan temon al la Komisiono pri Gramatiko.

Niaj aŭtoroj kaj oratoroj ja malvolvas la lingvon, kaj precipe ili devas tiun taskon plenumi. Niaj Lingvaj Institucioj kun fakaj Komisionoj devas subteni kaj instrui la bonan malvolvodon de Esperanto. La gramatikistoj kaj instruistoj de la internacia lingvo, ĉefe la aŭtoroj de lernolibroj, devas konscii la gravecon ke ili perfekte akordiĝu kun la decidoj de la Akademio.

TRANSLIMA PROCEDO

Ni do konsideras translima procedon de alia ajn esperantista societo aŭ korporacio decidi aŭ voĉdoni pri iu ajn lingva temo. Ĝis nun ni scias pri U. E. A. kaj S. A. T., ke ili alvenis tiun translimon. Tiu fakto kiu estas *principe* grava, efektive, ĝis nun, ne havigis al la esperantistaro gravajn rezultojn, sed oni devas pripensi la danĝerojn de tia procedo, kaj ni vidas tro riska ĝian principon en la Moralo de Esperantujo.

Ni opinias ke gazeto, precipe internacia gazeto, ne devas malakcepti ĉian vorton, en verkaĵo de responda aŭtoro, tial ke ĝi ne estas en la Oficiala Vortaro, sed ankaŭ esperanta gazeto, ĉu

nacia aŭ internacia, tute ne devas *sistemuzi* eĉ plej malgrandan reformon.

La ellaborejo por oficiala kaj sistema lingvo estu nur niaj Oficialaj Lingvaj Institucioj. Ĉiuj kleruloj alfluigu lingvan lumon kaj lingvan materialon al la komuna ellaborejo, kaj de ĝi defluu pura definitiva lingva riĉeco.

Sed dume ni ne forgesu ke ĉiam la *kreado* de lingvo elvenis ĉefe de *geniaj verkistoj*. Filologoj, lingvistoj estis ĉiam efektive reguligistoj kaj klarigistoj de lingva *kreitaĵo*. Zamenhof *estas la kreinto* de la lingvo internacia, ĉar li genie sentis la lingvan internacion, kaj li estis genia verkisto.

Geniaj verkistoj kaj esperanta popolo povas ankoraŭ senfine malvolvi la verkon de la Majstro.

Devojiĝo povas sekvigigi nur propran falon aŭ pereon, kaj perdon de semo, pli ĝuste, eble, de planto.

Neniu devojiĝu! 1926 alportu forton kaj saĝon al la Esperantistaro.

DELFI DALMAU

Je l' nova jaro

La jar' malnova agonias
 simila al maljuna vir':
 el lia brust' baldaŭ forflugos
 malforta lia lasta spir'.
 Ni ĝoje enterigos lin
 kun nuda nun la kalendaro; —
 ĉe l' pordo ŝtelatendas jam
 la nova jaro!

Ve! ofte dum l' antaŭa jaro
 abunde sangis nia kor';
 ni ĉiam vane luktis kontraŭ
 mizero, malfeliĉ', dolor' ...
 Sed ĉion ni forgesu nun
 ĉe plena glaso da nektaro:
 ekkantu ni honore de
 la nova jaro!

Ankoraŭ vivas la mensogo
 kaj estas homo ofte sklav',
 ankoraŭ grumbblas la militoj:
 ne ekaperas jam la Sav'.
 Sed kvazaŭ dia la Mesi'
 alportas jen al la homaro
 esperon novan je l' estont'
 la nova jaro!

Samideanoj ĉiulandaj,
 kunligas nin la sama cel':
 la nova jaro nin retrovos
 sub la standardo kun la stel'.
 Antaŭen ĉiam iru ni,
 nin ne haltigu tempa baro:
 promesas novajn venkojn ja
 la nova jaro!

JAN VAN SHOOR

Mia naskiĝurbo kaj ĝia foirplaco

Ĝis nun mi diris al vi nenion pri la urbo en kiu mi naskiĝis kaj vivadis ĝis mia deksepa jaraĝo. Mi ne donos al vi ĝian nomon, tio estas ne necesa; mi povus doni al vi multajn nomojn el la centoj, kiuj ekzistas kaj estas tre similaj al la mia pri kiu mi rakontas, sed ĝuste pro tio mi ne povas fari elekton, nek volas menciigi ĉe la mian, unu similas la alian kiel dunaskitaj infanoj. Se mi mem ne naskiĝis en ĉiuj, aliaj samsortanoj naskiĝis en ili, vivadis en ili, elkreskis kaj ricevis sian edukon en ili, edziĝis, revis, disreviĝis, ekzistadis kaj mortis en ili. Do se mi rakontos kaj priskribos unu sennoman el ili ĝi servos kiel priskribo de ĉiuj.

Mia urbo lokiĝis en la centro la (a) — permesita zono — kiu estas bone konata. En la mezo de tiu benata angulo de la tero, kie miaj fratoj la Izraelidoj estas la plimulto inter la enloĝantoj de ĉiu urbeto; tial ĝi estis konata inter la hebreoj kiel — Hebrea urbo —. Tie la hebreoj loĝas kunigitaj kaj kunpremitaj kiel sardeloj, kaj fruktiĝas kaj plimultiĝas kiel homaj estaĵoj. Ĝi kondukis kvazaŭ apartaĵo de la tuta cetera mondo kaj ekzistadis jam delonge kvazaŭ en songanta stato. Ŝajnis ke ĝi havis nenian rilaton kun la cetera mondo ĉirkaŭanta ĝin kun la bruo kaj ekscito konataj per la nomo progreso, civilizo kaj similaj antaŭenaĵoj. Estas vere ke de tempo al tempo tiu aŭ alia enloĝanto devis veturi al la apuda granda urbo por fari aĉetaĵojn por la butikoj, sed dank' al Dio, krom komercaĵoj ili enkondukis nenion alian el tiu granda urbo.

Se vi volas bone konatiĝi kun mia urbeto, malproksimiĝu de ĝi ioman distancon, tiam vi vidos ĝin entute kiel ĝi estas. De distanco mia urbeto ekaperos al vi en ĝia tuta beleco kaj ĉarmo. Montetoj ĉirkaŭas ĝin, kaj starante sur unu el tiuj vi vidos ke la domoj estas malgrandaj, malaltaj kaj malkomfortaj. Ili aspektas kiel malnovaj tomboŝtonoj sur antikva tombejo. Tomboŝtonoj malrektaj, kurbitaj kaj nigriĝintaj sur kiuj kreskas musko pro antikveco. Kiel ĉiuj aliaj similaj urbetoj ĝi enhavas la konatajn ĉefajn konstruaĵojn; kristanan preĝejon kun piroforma longa turo finiĝanta per kruco, apud la preĝejo simpla pastra domo staras kun lernejo, kaj la urbdomo troviĝas en la mezo de la foir-placo. Ĝi ankaŭ enhavis Sinagogon, Besmidraŝon (b) kaj apude la ŝvitbanejon kun la «Mikva» (c). Tiuj tri lastaj kons-

(a) «Permesita Zono.» Dum la Caraj tagoj en Rusujo kaj la Pola parto de Rusujo ekzistis distriktoj kie la Hebreoj ne estis permesataj loĝi, la aliaj distriktoj estis konataj kiel «Permesataj Zonoj.»

(b) «Besmidraŝ» Hebrea vorto por la preĝejo hebrea kiu estas uzata ne nur por preĝi en ĝi sed ankaŭ por sidi tie kaj studi la talmudon kaj la aliajn bibliajn komentariojn. En tio ĝi diferenciĝas de Sinagogo kiu estas nur por preĝoj.

(c) «Mikva» Banejo speciale aranĝita laŭ certaj leĝaj reguloj. Kutime ĝi troviĝas en la sama domo kie lokiĝas la ŝvitbanejo, sed en aparta ĉambro.

truajoj staris en la strato kiu kondukas al la hebrea tombejo, kaj je sufiĉe longa distanco de la kristana preĝejo. La ŝvitbanejo kaj la Mikva, kvankam starigitaj ekskluzive per la mono el la poŝoj de la hebreoj, estis multe uzitaj de la nehebreaj enloĝantoj de la urbeto.

Banĉambroj en la hejmoj de miaj samurbanoj estis afero nekonata, kaj la ŝvitbanejo kun la Mikva ludas gravan rolon ĉe la hebreaj enloĝantoj, ne nur sekularan sed religian. La Mikva tute aparte havas rilatojn kun certaj intimaj sentoj de la familia vivo. Neniu hebreido povas esti naskita en nia urbeto sen interveno de la Mikva... Ĉiuj fianĉinoj nepre devas viziti ĝin la tagon antaŭ la edziĝo... kaj ĉiu edziniginta hebreino periode devas viziti ĝin... La «Animo-cetera» (a) de sabato kaj festotagoj ne estis sentitaj de miaj hebreaj samurbanoj, se ili ne faris viziton al la banejo kaj la Mikva. Do la vendredaj kaj aliaj antaŭfestaj tagoj estis la plej aktivaj tagoj en tiu instituto. Tiam la hebreoj sen escepto kutimis veni post la longa semajna laboro, por sin purigi de la semajntagaj koto kaj malpuraĵo. Ili eniris tien kiel en sian propran patrolandon, kie ĉiu povas atingi la saman ŝtupon, supreniri la plej supran benkon, kaj vivigi sian mizeran animon almenaŭ por unu horo, kaj forjeti la pakajon da zorgoj kaj doloroj, kiuj ĉirkaŭis lin dum la semajno kaj ebenigi siajn laĉajn ostojn. Tie oni ne povis rekoni la diferencon inter diversaj rangoj kaj klasoj, riĉuloj kaj senhavuloj. Ĉiuj staris antaŭ la mirinda vaporo en benata egaleco. Tiujn tagojn ankaŭ utiligis la nehebreaj enloĝantoj por viziti la ŝvitbanejon, kaj tie interne flanke ĉe flanke ĉiuj varmigiĝis sur la benkoj, ŝvitis, sin batis per la specialaj balailoj kaj sin sapumis de kapo ĝis piedoj. Ĉiuj eliris el la ŝvitejo kontentaj, puraj kaj pretaj por la aliaj sep tagoj de laboro.

Sed mi devas reveni al mia ĝenerala priskribo de la urbeto. Enrigardante internen de la monteto sur kiu vi staras, ne serĉu en ĝi stratojn; kiam nia urbeto estis konstruita oni ne uzis arkitekturan mezurilon kaj cirklon, kaj oni lasis malmulte da spaco inter la domoj. Tio jam estis la kutimo de la prapatroj de la urbo, kie ajn oni trovis spacon oni konstruis sur ĝin. Spaco ĵa ekzistas por okupiĝo ne por alrigardo kaj ĝuo. Spite la senordo de la stratoj tamen, la enloĝantoj facile povis trovi siajn hejmojn eĉ en la mallumo de la nokto kun siaj edzinoj kaj infanoj, kiel la birdoj kiuj trovas siajn nestojn eĉ sen strataj lampoj.

La komenco de nia urbeto estis, tiel mi ĉiam imagis, en tiu flanko de la urbeto kie sin trovis la vojo kondukanta al la fervoja stacidomo; la stacidomo mem staris ĉirkaŭ duhora piediro for de la urbeto, kaj ĉiuj aliaj flankoj estis al mi nur finiĝoj de la urbeto. Mi diras finiĝoj, ĉar dum mia vivo tie ĝi neniam kreskis eksteren, la samaj stratoj kaj la samaj dometoj restis kiel ĉiam: Enveturante en la urbon per tiu vojo, oni ekvidis unue la preĝe-

(a) «Talmudo». Antikvaj parte hebreaj kaj parte Arameaj hebreaj libroj. Ili enhavas grandan diversecon de herbaj legoj, feaj rakontoj, fantaziaj rakontoj, vortoj de saĝeco kaj konsilo por la ĉiutaga vivo k. t. p.

jon kun la turo kaj la kruco, iom poste la dometon kie loĝis la barbisto — ĝi estis tre videbla pro ĝia longa stango kaj la du kupraj pladoj — kaj poste la urbdomon sur la foirplaco.

LA FOIR-PLACO

Dum la nefoiraj tagoj la placo estis sufiĉe malplena, escepte la frukto kaj vegetaj-vendistoj, oni vidis nenion sur ĝi. Tiuj vendistoj estis maljunaj virinoj, kiuj sidis sur benketoj la tutan tagon kaj atendis la maloftajn klientojn. Antaŭ ili staris trogoj plenaj da fruktaĵo kaj vegetaĵo dum la somero, kaj dum la vintro, terpomoj, sekaj faboj kaj nuksoj.

Ĉi tiun placon oni vere povis nomi la koro de nia urbeto, ĝi estis la vivcentro kiu ekbatis subite ĉiun jaŭdon kiam estis la oficiala foira tago. Tiam oni povas vidi grandan movadon en ĝi. Amaso da popolo sin trovis tiam sur ĝi. Kamparanoj kun siaj veturiloj ĉirkaŭstaris ĉie ajn, interplektitaj kaj intermiksitaj. Hebreoj kaj hebreinoj puŝiĝis kun la ĉevaloj, la radoj kaj la direktilstangoj de la veturiloj. Ĉiuj penis aĉeti la produktojn de la kamparanoj; kokinoj, anseroj, ovoĵ, butero, bulboj kaj terpomoj. Ĉiuj pinĉis la kompatindajn anserojn kaj kokinojn, palpis la terpomojn, prenis peceton de la butero per la fingro kaj gustumis, faris ofertojn, foriris kaj revenis kaj aĉetis.

Ĉi-tie kaj tie staris budoj, tabloj kaj benkoj sur kiuj sin trovis la ŝvitlaboro de la urbaj metiistoj: Botoj, ŝuoj, pantalonoj, koloritaj tukoj kaj ŝtofoj, jakoj, surtutoj kaj ornamitaj juvelaroj. Pingloj, broĉoj, koraloj, kudriloj kaj kotonfadeno. La placon ĉirkaŭis la domoj kun la butikoj en kiuj vendiĝis ankaŭ la suprenomitaj artikloj, kaj la kamparanoj, post vendo de siaj produktoj, ĉirkaŭiris de unu tablo al alia, de unu budo al alia, de unu butiko al alia, marĉandis, manfrapis, salutis, faris prezojn kaj malrapide aĉetis. Poŝtelistoj vestitaj en komparanaj vestoj sin intermiksitis en la amaso, kaj de tempo al tempo oni ekaŭdis laŭtan ekkrion de iu kamparanino — «Je Dio! mi estas priŝtelita!» Kaj ve al tiu ŝtelisto kiu estis kaptita. La kamparanoj fariĝis la juĝistoj, uzis siajn pugnojn, vipojn kaj bastonojn ĝis kiam la unu sola policano en la urbo alvenis kaj savis la ŝteliston de frua morto, arestigis lin kaj ĉio fariĝis kiel antaŭe.

Tie en angulo oni vidis homon kun kesto, kiun li antaŭ momento starigis sur disfalditan dupiedon. Junuloj kaj kamparanoj pagas po malgrandaj moneroj kaj enrigardas en la truon de la kesto, kaj la homo turnas manilon kaj deklamas:

— «Tio estas la granda urbo London. Tie-ĉi preterrajdas surĉevale lia moŝto la Papo kun Ruĝaj pantalonoj kaj ĉiuj staras antaŭ li senĉapele. Nun vi vidas kiel Napoleono kun siaj francaj soldatoj batalas kontraŭ la Prusoj kaj la Prusoj forkuras kiel ratoj — Ha, ha, ha! ekridas la enrigardantoj — Jen la turka Sultano rajdas en Kaleŝo, la kvar ĉevaloj timiĝis, suprenturnis la kaleŝon kaj la sultano elŝutiĝis el la kaleŝo. Nu sufiĉas jam por via mono! permesu ke aliaj aliru kaj vidu la mirindajn vidindaĵojn!» —

Antaŭ la butikoj staras knabinoj kaj virinoj, ili envokas la kamparanojn en la butikojn per ĉiuspecaj allogaĵoj. Kaptas ilin ĉe la manikoj kaj entiras ilin internen. Hebraj portistoj kun pezaj ŝarĝoj sur siaj dorsoj kaj kurbitaj preskaŭ duone malsupren, penegas elŝoviĝi el la amaso por forpreni la pakaĵojn kaj reveni por aliaj. Hodiaŭ estas ankaŭ ilia rikolta tago.

Tiel bruas, zumas kaj bolas la foir-placo la tutan tagon de la foiro. La suno komencas subiĝi, kamparanoj aljungas siajn ĉevalojn al la veturiloj, enpakas la aĉetaĵojn, kaj unu post alia forlasas la placon kaj la urbon. Ĉio fariĝas kvieta kiel antaŭe, kaj restas tiel ĝis la proksima ĵaŭdo. Dumtempe la butikoj malpleniĝis, ĝiaj estroj kalkulas la monon, kontrolas la restintan provizon de la komercaĵo kaj komencas prepari por vojaĝo al la apuda granda urbo por fari novan aĉetaĵon por la proksima foira tago.

Tiun tagon de la foiro mi ĉiam antaŭrigardis kun avido. Mi ne iris al la lernejo en tiu tago, ĉar mi devis helpi al mia patrino en la butiko, faris pakajojn, kuris al la najbaroj por pruntepreni artikolojn kiuj mankis al ni por vendo, kaj plejĉefe, mi devis atente alrigardi la klientojn ke ili ne ŝtelu dum la marĉandado. Tiuj foirtagoj estis al mi tre utilaj. En ili mi lernis la lingvon de la kamparanoj, kiuj ne povis paroli la hebrean lingvon, kaj ankaŭ lernis la arton de komerco, aŭ pli bone diri de marĉando.

Du gravaj objektoj ekzistis en mia urbeta vivo. Ili estis la plej ĉefaj aferoj en la vivo de miaj samurbanoj. Unu dependis de la alia; estis la Sabata tago kaj la foira placo. De la foira placo dependis la tuta ekzistado de miaj samurbanoj, sed estis nur por la sabat-tago ke la foirplaco entute devis ekzisti.

Se iu per magia bastono, aŭ miraklo, povus forigi aŭ elviŝi la sanktan sabaton el la vivo de nia urbeto, samtempe ankaŭ estus malaperinta la graveco de la foira placo. Ĉiu hebreo en mia urbeto nur laboris la tutan semajnon por gajni tion kion li bezonis por sabato. Ĉiuhore, ĉiutage la vorto — Sabat — estis sur iliaj lipoj. «Oni ja devas perlabori por sabato» diris ĉiu hebreo, kiam li kontente rakontis al sia amiko pri iu profitiga negoco.

Oni diras pri la angla mezklasa laboristo ke li laboras la tutan jaron por havigi al si la monrimedojn, por libertempi unu aŭ du semajnojn dum somero ĉe la marbordo. La hebreoj en mia urbeto faris same dum ĉiu semajno. Ilia celo estis havigi monrimedojn por festi la sabatagon. Ili malsatis la tutan semajnon, manĝis sekan panon kun peceto de nekuirita bulbo entrempita en salo, aŭ kelkajn boligatajn bulbojn, kio ajn sufiĉis por kunteni la korpon kaj la animon. La celo estis prepari ion bongustan por sabato. Tiam oni nepre devas havi decan manĝotablon. Blankajn plektitajn panojn, fiŝon kaj viandon.

Sabatagaj himnoj promesas al la Hebreo bonegan estontecon en la venonta mondo, se ili bone manĝas en sabato kaj dividas sian manĝaĵon kun la malriĉaj hebreoj kiuj posedas nenion.

« — Per bona manĝo, bona trinko
Per multfrandaĵoj, gastameco,

Estonton bonan vi atingos,
Ĉe l' ven' de l' tag' en viv' venonta.» —

kantas la hebreo ĉiu sabattage dum la manĝo.

Tuj post la fermo de la butikoj post la foirtago, komenciĝis la sabat-preparo. Ĉiu domo en la urbo, laŭ ĝia ebleco kaj bonhavo, fariĝis bakejo kaj kuirejo. Oni bakis, kuiris, purigis la ĉambrojn, lavis la infanojn kaj la ĵolaĵojn. Sabato estis grandioza afero por miaj samurbanoj kaj ludis gravegan rolon en la vivo, tial oni bezonis la butikojn, la kamparanojn kaj la foiran placon.

LA FIANĈINO SABATO

«Pro honoro de Dio. Pro honoro de Liaj ordonoj.
Pro la an.ata sankta Sabato, mi bruligas la sanktigitajn kandelojn».

(El preĝo kiun diras hebrea virino ĉe bruligo de la kandeloj vendredon vespere, antaŭ la sunsubiĝo)

La plej agrablaj horoj en nia hejmo, kiel en ĉiu ortodoksa hebrea hejmo, ĉiam estis la dudekkvar horoj de sabato, kiu daŭras inter la sunsubiro de vendredo kaj sabato vespere. Ĉiu hebreo, laŭ tradicio, posedas du animojn. Unu estas la kutima animo ĉiutaga, la dua estas, kiun la talmudo nomas — La animo cetera —. Ĝi eniras en la hebrean korpon vendredon vespere kaj forlasas ĝin sabaton vespere post la finiĝo de sabato. Tiu animo estas unu el la plej sanigaj balzamoj, kiun oni povas donaci al iu malfeliĉulo, malsaniĝanta spirite, kuraĝe, poŝe aŭ humore. Mia patro, kiel ĉiu alia hebreo en nia urbo, ricevis kun la alveno de sabato ne nur novan animon, sed novan spiriton, novan vivon. Ne gravis kiom ajn estis liaj ĉagrenoj dum la semajno; kaj tiuj ne mankis al li; tuj kiam la sabato komenciĝis ĉio estis forgesita. Vera transformiĝo okazis en lia tuta sinteno je la alveno de tiu nova animo cetera. Mi oft evidis lin baraktantan kun diversaj sortoj de la ĉiutaga vivo dum la semajno, sed dum sabato li estis tute serena kaj feliĉa, kaj kun li ni, liaj infanoj. La mirinda por-sabata animo faris miraklon por la fianĉo de sabato.

La fama Germana Poeto Heine, kiu pro sia juda deveno verŝajne mem spertis en sia juneco la ekstazon de sabato, ĝuste priskribas la spiriton de tiu transformiĝo en sia poeziaĵo: —

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la miljtista cenzuro.

PRINCINO SABATO

En araba fabel-libro
vidas mi sorĉitajn princojn,
kiuj ofte la antaŭajn
belaspektojn reakiras.

Jen la harkovrita monstro
refariĝas Reĝo-ido;
ornamriĉe brilvestita,
enamige fluton blovas.

Sed subite flugas for la
sorĉa tempo, kaj ni vidas
lian reĝan princo-moŝton,
kiel aĉigitan monstron.

Pri reĝid' de tia sorto
kantas mia kant'. Izrael
li nomiĝas. Sorĉodiro
lin al hund' aliformigis.

Hund' kun hundaj pensoj, li la
tutsemajnon sklave vagas
tra la nokt' kaj sterk' de l' vivo;
Mokobjekto de l' stratbuboj.

Sed vendred-vesperon ĉiun,
en krepuska hor', subite
iras for sorĉaj' kaj hundo
iĝas hom-estaj' denove.

Hom-estaj' kun homaj sentoj,
kun levita kap' kaj koro,
feste, pure privestita,
paŝas li en patran halon.

«Mi salutas Hal' amata!
De Reĝpatro mia. Tend' de
Jakob, viajn enirfostojn
sanktajn, buŝo mia kisas».

Kiaj benataj horoj estas tiuj dudek kvar horoj de sabato sankta por mult-
miloj da viroj kaj virinoj en la hebrea mondo! Sabato sankta, la fianĉino de
ĉiu hebreo!!

(a) «Leĥo daŭdi likras kalo!» —
Iru kara, vin atendas
fianĉino. Ŝi malkovras
la vizaĝon vin akcepti» —

estas parto de la vendreda vespera preĝo en la sinagogo, deklamita de ĉiu
kantoro per sia plej ekstaza kaj sonora voĉo. Kiom da junaj koroj eksaltis
pro ĝojo ĉe la eĥo de tiuj gajaj melodioj, kiuj kutime akompanas la suprajn
kaj la sekvantajn liniojn de tiu preĝo: —

«Renkonti sabaton ĉiuj ni iru,
ĉar ŝi estas fonto de beno.

De la komenco, jam de antaŭe,
ŝi la princino estas kronita.

(a) «Leĥo daŭdi likras kalo» estas la hebreaj vortoj de la teksto, ĝia
signifo sekvas en la dua linio kaj poste. Heine uzas ĝin en la originala
teksto.

Forskuu la polvon, leviĝu!
Vestiĝu en roboj
de via beleco, mia popolo!»

Kiu povas taksi la valoron de tiu juvelo-Sabato? Ĝi ornamadas la spiriton kaj la korpon de ĉiu ortodoksa hebreo. Dudek kvar horoj da trankvila kaj benata ripozo de ĉiuspeca zorgado kaj turmento kiuj ĉirkaŭas la tutsemajnan vivon de la hebreo. — «kun la alveno de Sabato alvenas trankvilo kaj ripozo» — estas talmuda maksimumo, kiu enradikiĝas en la hebrean koron de ĝia juneco.

Je la sunsubiro vendredon vespere la patrino de la hejmo bruligas la sabat-kandelojn, kiuj staras sur blanka tablotuko en kupraj aŭ arĝentaj ingoj. Ŝi kovras sian vizagon per ambaŭ manoj kaj diras: —

«Benita estu vi mia Dio, Reĝo de l' mondo, kiu sanktigis min per ordonoj, kaj ordonis min bruligi la kandelojn de sabato. Pro honoro de Dio, pro honoro de liaj ordonoj, pro la amata sankta sabato, mi bruligas la sanktajn kandelojn.» —

Ŝi preĝas silente kelkan momenton por la bono de ĉiuj amataj domanoj kaj amikoj, kaj kvazaŭ neĝo degelas en unu momento ĉiuj ĉagrenaj pensoj de la semajno antaŭ la sankta fajro de tiuj sabat-kandeloj. La sankta sabato komenciĝis; oni devas ne plu pensi pri negoco aŭ kiu ajn malspirita afero ĝis la sunsubiĝo sabaton vespere.

La bruligo de la sabat-kandeloj estas laŭ hebrea tradicio grava devo por la virino. La hebrea virino havas la devon iagrade repagi al la homarion, kio estis forrabita de ĝi per la ago de ŝia pra-fratino. Evo estingis la lumon-animan de la homaro per sia instigo al Adam en paradizo, ke li manĝu de la «pomo-de-scio», kies rezulto estis ke la homo fariĝis mortemulo kaj lia animo estingiĝas je l' morto. Tial la hebreino nepre devas bruligi almenaŭ du kandelojn ĉiun vendredon vespere je la komenco de Sabato.

LA BENO DE LA SANKTA SABATO

Kiam la hebreo forlasas la sinagogon vendredon vespere por iri hejmen, du Anĝeloj akompanas lin survoje hejmen. Unu estas bona anĝelo kaj unu malbona anĝelo. Kiam la trio eniras en la domon kaj trovas la kandelojn bruligitaj kaj ĉion preparita en gaja kaj bona ordo. Sur la tablo, pura kaj blanka tablotuko, bongusta manĝaĵo, abundeco kaj serena atmosfero ĉirkaŭe, la bona anĝelo kun ĝojo eldiras: «— Proksiman sabaton estu same — »! — kaj la malbona anĝelo kontraŭvole aldonas «Amen». Se la malo regas en la hejmo, tiam la malbona anĝelo kun malico eldiras: «— Proksiman sabaton estu same!» — kaj la bona anĝelo kontraŭvole aldonas

«Amen». Tial ĉiu hebreo prizorgas ke vendredon vespere regu en la hejmo, paco, trankvilo, sereneco kaj bone preparita manĝotablo.

Eĉ la plej malriĉa hebreo penegas prepari bonajn manĝaĵojn por la sabata tago. — «Ĉu vi jam gajnis por sabato?» — estas kutima demando de unu malriĉa hebreo al alia ĉe ilia renkontiĝo dum la tuta semajno. Kvankam mia patro ne nombris sin inter la riĉuloj, tamen la sabat-manĝaĵo ĉiam estis alloga, pro la freŝaj sabat-ĥaletoj, (a) la kuiritaj fiŝoj kaj la viando kun la «ĉimos». (b)

«Estas nenia troigo diri, ke ni infanoj kune kun la gepatroj, ekzistadis la tutan semajnon per la antaŭĝuo de tiuj sabataj manĝaĵoj. Kiel ni ĉiuj atendis avida la revenon de la patro el la sinagogo vendredon vespere. Tute trankvile ni toleris ĉiun tiranecon de nia avino vendredon posttagmeze; la sisteman kaj perfektan purigadon de nia hararo per la malgrand-denta kaj delikata kombileto kiun ŝi uzis, kaŭzante per ĝi senfinajn dolorojn, la ĝisfundan ĉirkaŭlavon, kaj ni eĉ staris respektoplenaj kiam la avino, post la bruligo de la sabat-kandeloj, metis siajn manojn sur niajn kapojn kaj laŭ tradicio benis nin; — «Dio vin faru kiel Efraim kaj Menaŝe (c)!» — .

Belaj estis tiuj vendredaj vesperoj. La patro post veno el la sinagogo eniris kun ridetanta mieno, salutis nin per la kutima «Bonan Sabaton!», patrino en sia edziĝa jupo reciprokis per egale ridetanta vizaĝo, kaj la patro tuj komencis tiun komplimentan deklamaĵon (Proverbo Ĉap. 31) — «Virtan virinon kiu trovas, pli multe ol juveloj estas ŝia valoro» — kaj la tutan ĉapitron kiu finiĝas per — «falsa estas la gracio kaj malsaĝaĵo la beleco. Di-timanta virino estas laŭdinda, donu al ŝi la frukton de ŝia mano, kaj ŝiaj faroj estos laŭdataj en la pordegoj de l' urbo» — . Tiun ĉapitron el la proverbo kantas ĉiu hebreo antaŭ la manĝo vendredon vespere. Ĝi estas malgranda kompenso al la edzino, por ŝiaj penoj dum la semajno en la mas-trumado kaj la bona preparado de la sabat-manĝaĵo.

Kun vera ekstazo aŭskultis mia patrino al tiuj eldiroj, sentante en sia koro ke la patro ilin direktis al ŝi, kaj el la deklamo de Kiduŝ, (d) kiam la patro levis la gravuritan arĝentan pokalon plenan je ruĝa vino kaj eldiris per la agrabla melodio bone konata; —

(a) «Ĥaletoj» estas la hebrea vorto por plektitaj blankaj panoj kiuj ofte estas uzitaj por Sabato.

(b) «Ĉimos.» Estas postmanĝaĵo; kuiritaj fruktoj, plej ofte sekigita frukto miksitaj el prunoj, pomoj kaj piro. La vorto «Ĉimos» enradikiĝis por tiu manĝaĵo.

(c) «Efraim kaj Menaŝe» estas la du filoj de Jozefo en Egiptujo, kiuj supozeble estis benitaj per beleco, saĝeco kaj ĉio kio estas bona en la mondo.

(d) «Kiduŝ» La bonvena preĝo kiun diras ĉiu hebreo je la komenciĝo de sabato, antaŭ la manĝo vendredon vespere post sia reveno el la Sinagogo.

«Kaj estis finitaj la ĉielo kaj la tero kaj ĉiuj iliaj apartenaĵoj. Kaj Dio finis en la sepa tago Sian laboron, kiun Li faris, kaj Li ripozis en la sepa tago de la tuta laboro, kiun Li faris. Kaj Dio benis la sepan tagon kaj sanktigis ĝin, ĉar en ĝi Li ripozis de Sia tuta laboro, kiun Li faris kreante». —

Ni infanoj ĝuis la kontentecon kiu regis en la hejmo kaj sur ĉies vizaĝo kun la sama freŝeco ĉiun vendredon vespere, kvazaŭ ĝi estus granda novaĵo.

LA MALGAJA DISIĜO

Antaŭvidante la tutan semajnon kun sopiro la alvenon de la sabato, la hebreo nature disiĝas de tiu bela tago tre malfacile kaj kun granda bedaŭro. Mia patro kutimis sidi ĉe la tablo por la tria manĝo sabaton posttagmeze ĝis tre malfrue nokte. Li ne permesis la bruligon de la lampo, signo de finiĝo de sabato, ĝis kiam oni klare povis vidi en la ĉielo multajn stelojn amasigitajn kune. En la krepusko de ĉiu sabata vespero mia patrino kutimis deklami, ĉiam per la sama melankolia melodio, kiu tamen estis agrabla al niaj oreloj; —

Dio de Abram,
Dio de Izaak,
Dio de Jakob,
Sinjor' de l' ĉiuj mondoj!

La sankta sabato foriras,
Kun ĝi nia ripozo.
Nova semajno alvenas,
Kun ĝi novaj ĉagrenoj.

Nova semajno alportas
Al viaj kompataj infanoj,
Novajn zorgojn,
Novajn timojn.

Tial, estu via volo,
Ke la nov-venant-semajno,
Pordojn de kompat' kaj beno
Por ni ĉiuj tuj malfermu.

Eliohu la profeto,
Prenas la bastonon
En la dekstran manon.
Kaj eldiras benon
Super tutan landon.

Tiel laŭte,
 Tiel bele.
 Diras^ĉĉiuj
 Infanetoj;
 «Amen kaj Amen»!

Kaj ni infanoj ripetis post ŝi la vortojn — «Amen kaj Amen!». Eliohu la profeto kiu supreniris ĉielen en fajra kaleŝo trenita per fajraj ĉevaloj, havas apartan lokon en la koro de ĉiu hebreo. Li estas unu el la plej grandaj boneguloj kaj la gardanta anĝelo de ĉiu bona hebreo. Mia patro, patrino kaj mia avino, ĉiuj kredis ke Eliohu la profeto nepre prizorgas nin ĉiujn de la finiĝo de sabato ĝis la fino de la semajno. Se mia patrino iam faris bonan negocon en la butikoj kun iu kamparano nekonata al ŝi, ŝi vere kredis en sia koro ke estis Eliohu la profeto, kiu venis en alivestiĝo de kamparano por tiu celo. «Kiu scias — elĝemis ofte mia patrino — eble Eliohu la profeto venos kaj alportos ion bonan por la venonta semajno». —

Kun tiu forta espero por la nekonata venonta semajno, tamen venis malĝojo ĉe la finiĝo de sabato. Post la supra deklamo la patrino leviĝis malrapide, forprenis la blankan tablotukon kaj bruligis la vakskandelojn, simbolo de malĝojo kaj bedaŭro. Baldaŭ poste la patro kun profunda ĝemo plenigis la pokalon el la restinta vino kaj diris la «Havdala» (a) la adiaŭpreĝo al la fianĉino sabato. Li tenis en sia dekstra mano la pokalon kaj en la maldekstra mano arĝentan ujon plenan je aromajoj kaj spicoj dum la deklamo, kaj tuj post la fino de la deklamo li flaris profunde kaj kore el tiuj aromajoj, eltrinkis la vinon kaj verŝis la lastajn restintajn gutojn sur la tablon, kaj en la gutojn li trempis la brulantajn kandelojn, kiuj post kraketo estingiĝis.

Tiel malaperis la bela tago en aro da ceremonioj kaj ritoj neniam forgeseblaj. Heine la fama Germana poeto esprimas la malĝajecon de tiu momento kaj ĝian profundan signifon je la fino de sia poeziaĵo «Princino Sabato» jam citita antaŭe; —

Sed la bela tag' forflugas;
 Kvazaŭ per ombrecaj kruroj.
 Paŝas nun al li malbena,
 Hor' malbona — Princo ĝemas.

Sentas li ekprem' glacia
 De sorĉfingro ĉe la koro.
 Jam trafluas lin frosttremoj
 De la hund-metamorfozo.

(a) «Havdala» estas la adiaŭa preĝo ĉe la finiĝo de sabato.

La princin' al princo donas
 Ujon plenan d' aromaĵo.
 Pense flaras li — ankoraŭ
 Fojon volas sin ĝojigi.

La princin' regalas princon
 Ankaŭ per adiaŭ — trinkaĵo — .
 Rapideme li eltrinkas,
 Nur malmultaj gutoj restas.

Nun la tablon li aspergas,
 Prenas tiam vakskandelon,
 Trempas ĝin en la malsekon,
 Ĝi kraketas, estingiĝas.

J. D. APPLEBAUM

Premiita en la XIaj. Floraj Ludoj.



Pro... kaj Por...

La nova organizo de K. E. F. provita en la finiĝanta jaro, pruviĝis sukcesa. Eble unuafoje, en la funkciado plena de nia Federacio, ĝi alvenis la finon de la jaro sendeficite, eĉ doninte la tutan kvanton de nia gazeto po 16 paĝoj po unu monato; eĉ aldoninte eksterordinarajn ilustraĵojn al ĝi. La kotizoj de individuaj kaj asociaj membroj, la memstarigo de la abono por la gazeto, estas bonaj bazoj. Plie, la nova organizo de K. E. F. realigis pli vastan, pli firman ĉirkaŭprenon de nia movado en la Katalunlingva teritorio. Tamen ni ne akurate plenumis la eldonadon de «Kataluna Esperantisto», ĉiumonate, ĉiunumere; tial ni devas peti senkulpigon, malgraŭ ke la kaŭzo de tiu malreguleco estas en la flanko de la presejo, kiun ni pro kelkaj motivoj devas akcepti. Sed novaj cirkonstancoj permesas al ni vidi ke de la nova jaro «Kataluna Esperantisto» aperos regule, ĉiumonate. La elpreso de la *Kataluna Antologio*, kaj la ekonomia stabilo atingita de K. E. F. estas du el tiuj cirkonstancoj:

Mia Fianĉino

ŜI PAROLAS

Dolĉe, milde ŝi parolas
kun arĝenta voĉsonor' ;
kiam ŝia voĉ' petolas,
en ĝi laŭte tintas or' .

Estas ŝia voĉ' kaskado
de sonoroj de kristal' ,
melodia serenado
de mirinda najtingal' .

Sonu ĉiam, voĉ amika,
kun gajec' de sonoril' ,
kun reviga ĉarm' muzika,
kun purec' de birda tril' !

ŜI RIDAS

Ŝia rido ravas min
per gajeco radiantaj;
ŝia kara ĝojinklin'
montras sin per rido kanta.

Kiam sonas ŝia rid' ,
en mi estas ĝoj' intima,
je ŝi kreskas mia fid' ,
mia am' iĝas senlima.

Nu, de ŝia rid' sen ĉes'
fluu ĉiam la torento!
Nova rid' — nova promes'
pri l' feliĉ' de mia sento!

ŜI RIGARDAS

Kiam pasie ŝi rigardas,
fajron ŝi havas en okul' ;
ŝiaj pupiloj ame ardas
ĉar en kor' estas ama brul' .

Pro l' ama ard' , ŝia pupilo
pli luma estas ol ĉiel' ;

min pli ĝojigas ĝia brilo
ol de la tago la lumhel' .

Restu por ĉiam tiaj bruloj
en ŝia korp' plena de am' ...
Ĉiam en ŝiaj fajr-okuloj
brilu de l' am' la dia flam' !

ŜI KARENAS

Estas ebria la plezur'
kiam ŝi dolĉe min karenas;
pliajn feliĉojn ekpromesas
dolĉa kares' ol ama ĵur' .

De la karesoj la murmur'
en intimec' nia ne ĉesas.
Tiam la mondon ni forgesas
kaj vivas nia amo nur.

Min ebriigu la plezuro
de ama ĵuro kaj kares' ;
vibru sen ĉes' kares-murmuro,
en la plezuro de l' forges' !

ŜI AMAS

En la deziro ami ŝin
mi jam de longe min konsumas.
Ĉe ambaŭ ni l' espero lumas:
Fine ni baldaŭ havos nin.

Ŝi amas min, sed tia am'
estas pri am' nur antaŭsento...
Kiam alvenos la momento
bruligi nin en l' ama flam' ?

Nur dum ŝi *amos*, vivos mi
kun riĉa sent' de vivo forta:
am' ŝia faros min senmorta
kaj tiel pova kiel Di' !

JAUME GRAU CASAS

(El H. Heine)

Vi estas bela, pura,
aminda kiel flor' .
Vin vidi dolĉdoloron
estigas tra la kor' .

Benkovri vian kapon
io devigas min.
Di' gardu tiom bela,
aminda, pura vin!

Trad. E. JUNG

Ĉe Samovaro

Ĉe malnova samovaro
sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo zume bolas,
la amikoj ekparolas.

«Havi landon en libero,
tamen migri tra la tero,
iri vojon, sed sencelan...
Ĉu vi konas pli kruelan?»

La hungaro ne respondas,
liaj pensoj ĝeme ondas,
viŝas larmon retenitan.
«Havi landon, sed perditan...»

Ĉe malnova samovaro
sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo bolas zume,
ili ploras... ploras kune.

JULIO BAGHY

Premiita en la XIaj. Floraj Ludoj



Pro... kaj Por...

Interkorespondado. — Al ni alvenis multaj proponoj kaj petoj por interkorespondado kaj interŝanĝoj. Unu estas tre serioza pri pedagogio. — Kial, anstataŭ privata korespondado la proponinto ne verkas por esp. ĵurnalo aŭ gazeto, t. e. por publiko? Tio instigos aliajn ankaŭ verki pri la sama scienco laŭ la propra lando, kaj li samlabore atingos pli da efiko. Krome, estas adresaroj de interŝanĝuloj, kolektuloj, koresponduloj ktp. — Kial oni por ĉio pasas la delegitojn de U. E. A? Kompreneble la delegito de U. E. A. transdonis la proponon al esp. instruisto. — Sed ĉu tiu respondos? Do por interŝanĝado estas pli efike enskribigi sin en la koncernajn adresarojn, aŭ ilin utili kaj per ili elekti korespondanton aŭ interŝanĝanton, kiu eĉ anoncas sin kun tiu celo.

Mistera fraŭlino

Kiam mi ŝlisis pordon de mia kajuto, proksime en la koridoro ekaŭdiĝis ies paŝoj multepezaj kaj rapidemaj. Returniĝinte, mi ekvidis la vaporŝipestron, kiu rapidis ien, sulkinge la frunton kaj fiksis antaŭen seriozan rigardon de siaj grizkoloraj okuloj.

— Bonan matenon! — mi diris, ĝuste lia granda, malvigla figuro atingis min.

— Ha! — li ekkriis, haltante por unu momento kaj etendante al mi sian dikan manon. — Ĉu vi jam vekigis? — kaj, jam daŭrigante sian vojon, li aldonis per rapida parolmaniero: — Se vi enuas tie-ĉi pro izoleco, iru supren kun mi!... — kaj malaperis sur la ŝtuparo.

Mi ekkuris post li kaj, malfacile spirante, baldaŭ leviĝis laŭ kruta fera ŝtuparo sur la supran ferdekon de la vaporŝipo, kie estis vidata grandlitera elokventa averto: «Oni malpermesas al privatuloj eniri ĉi-tien» kaj kie atendis min la vaporŝipestro.

Estis nebula printempa mateno. Akra malvarma vento blovis ĝuste renkonten al ni, disblovante niajn baskojn kaj penante malice senĉapigi nin. Pro densa nebulo nenio estis videbla eĉ je dek paŝoj. Je proksime aŭdiĝis senĉese alarmaj fajfsignaloj diversvoĉaj de du vaporŝipoj.

Ni preteriris kelkajn vaporŝipanojn, kiuj jen sin ŝovis tien kaj tien ĉi tra la ferdeko, jen staris apud rando mem de la ferdeko kun longaj stangoj en la manoj kaj pretaj tuj ion fari, ĵus afluĝos al ili komandovoĉo.

— Nu, en kia stato estas la afero?,,, — la vaporŝipestro demandis afable sian helpanton, ĵunan bravulon, kiu, vestita je leda ĵako, staris sur la komandponto kaj fikse rigardis ien tra la nebulo.

— Ni ree ĵetis la ankrojn... Diabla nebulo!...

— Kie ni estas?

— Proksime de promontoro Varjuŝkin, ni ĵus preteriris Udaĉa'on... Faru ree alarmsignalon! — Li ekkriis al iu laŭtege kaj tuj, superonante lian voĉon, ekaŭdiĝis akresona fajfo. Eĥo tuj ripetis la signalon kaj similaj alarmaj fajfoj ekaŭdiĝis antaŭe kaj malantaŭe de la vaporŝipo.

— Faru pli ofte la signalojn! — ordonis la vaporŝipestro kaj ekpaŝis laŭlonge de la ferdeko.

— Por kio oni faras la signalojn? — mi demandis lin sekvante post li paŝo post paŝo. — La nebulo ja estas densega kaj estas riskoplene daŭrigi la vojon.

— Jes... Tamen inter ni estas kuraĝuloj, kiuj malgraŭ malpermesoj kaj danĝero, neniam haltigas sian vaporŝipon. Jen, por eviti kunpuŝiĝon kun ia tia kuraĝulo, oni faras la alarmsignalojn, sciigante pri sia proksimeco...

Ree ekaŭdiĝis la signalo, ree eĥo mokimitis ĝin kaj ree, kvazaŭ responde al ĝi, ie tre proksime ekaŭdiĝis tia sama signalo de alia vaporŝipo.

La vaporŝipestro rapidege turniĝis kaj zorgatakte ree ekpaŝis al sia

helpanto deĵorinta. Sed en tiu momento la nebulo subite disiĝis kaj proksime de ni aperis de ie granda duetaĝa vaporŝipo, kiu malrapide, kvazaŭ palpe, moviĝis renkonte al ni.

— Jen, vi vidas!... — mia akompananto montris ĝin per la mano, kvazaŭ jesante siajn vortojn.

Eksonis komando, ekbruis ĉengrincado kaj post unu minuto la vaporŝipo ekmoviĝis. La vaporŝipestro prenis min je la mano kaj ekspiris kun plifaciliĝo.

— Nu, nun ni povas esti trankvilaj! — li diris malsupreniĝante. — Ĉu vi volas teon, sinjoro? Nun ĝuste estas la horo, dum kiu mi kutime ĝuas trinkadon. Ni babilu...

Mi estis ĝoja je la propono de la estro, kun kiu mi konatiĝis nur antaŭtage vespere kaj kiu ŝajnis al mi tre inteligenta kaj simpatiplena viro. Apud pordo de lia kajuto jam atendis lin unu servanto kun bruanta samovaro en la manoj.

— Ankoraŭ unu glason! — li ordonis, ĵus ni eniris en la kajuton kaj la servanto metis la samovaron sur la tablon.

La kajuto estis malgranda, sed tre pura kaj bele ornamita. La mastro sidigis sur sian kutiman lokon apud fenestro kaj montris al mi apud si malaltan kunmeteblan seĝon.

— Mi aŭdis, tiu-ĉi loko estas plej danĝera en la tuta spaco de la rivero... — mi diris por rompi silenton, kiu delonge jam ĝenis nin ambaŭ.

— Jes... — ne tuj, kvazaŭ hezitante, respondis la mastro, verŝante teon en la glasojn, — precipe dum printempoj!... Tie ĉi la rivero estas tre kurbeca; en la spaco de kvin verstoj ĝi faras dudek du grandajn kaj iajoje tre subitajn kurbaĵojn. Kompreneble, ili estas sendanĝeraj, — vaporŝipdirektistoj konas bonege ĉiun plej malgrandan kurbaĵon kaj kondukos kian ajn vaporŝipon eĉ kun ligitaj okuloj. Tiel la afero estas dum someroj, sed dum printempoj!... La bordoj de la rivero estas malaltaj kaj superakvataj por longa tempo, la fluo estas tre rapida kaj naĝosignoj ofte estas forportataj de ĝi... Jen kiaj ĉarmaĵoj estas tie printempe kaj se en tiu ĉi spaco vaporŝipo renkontos ankoraŭ nebulon, tiom kutiman printempe, nu, tiam...

— Ĉu ofte okazas katastrofoj?...

— Ĉiujare ne unufoje...

— Kaj ĉu via vaporŝipo...

— Mi navigacias jam dekokan jaron, tamen Dio ĉiam gardas mian vaporŝipon de katastrofoj. Iajoje okazis negrandaj aventuroj, tamen unufoje...

Li silentiĝis kaj longe rigardis min per explorema rigardo, kvazaŭ hezitante aŭ timante ion.

— Jes, unufoje estis stranga okazo, kiun mi neniam forgesos, — li poste daŭrigis. — Mi rakontis pri ĝi ankoraŭ al neniu, tie, vi vidas, estas sekreto, mistero, kiun mi ĝis nun ne povis klarigi al mi, kvankam ĝi okazis antaŭlonge, ĝuste dum la unua mia navigacio. Mi estis tiam junulo, ĵus fininta kurson de navigacia lernejo, tute ne sperta-kaj ne lerta... Vintre mi forlasis la

lernejoj kaj printempe oni jam donis al mi, kiel al unu el plej bonaj lernantoj, oficon de helpanto de vaporŝipestro. Ordinare, pli frue ol ricevi tian oficon, oni devas dum unu aŭ du jaroj esti praktikanto sur la granda vaporŝipo sub gvidado de spertuloj, sed mi kiel mi jam diris al vi, tuj ricevis la oficon. Tio ĉi, kompreneble, plenigis mian animon per fiereco... Tiam estis tie ĉi malnova granda vaporŝipo «Fierulino...» jen sur ĝi mi ricevis la oficon. Ĝia estro estis maljuna, lerta, sed iom maldiligenta homo, kiu pli ŝatis sin ŝajnigi malsaneta, ol deĵori sur la komandponteto. Nu, kiel okazis tio-ĉi, mi ne memoras, sed li ekmalamis min preskaŭ de la unua tago. Li ĉiam mokis je mi, estis malĝentila al mi kaj, kiel intence, ĉiam estis malsana, kiam vetero estis malbela kaj ventega, pro kio, en tiaj okazoj, mi ĉiam devis komandi la vaporŝipon. Mi ĉion toleris pacience, esperante, ke la maljunulo baldaŭ inde taksos mian laboremon, obeemon kaj paciencon. Nu, mia tasko ofte estis tre malfacila, tamen miaj subuloj — vaporŝipdirektistoj estis senriproĉaj spertuloj kaj fidindaj konsilantoj kaj helpantoj... Jes, kara mia, tiamaniere pasis la printempo kaj la somero, komenciĝis la aŭtuno, ofte ankaŭ tre neagraba sezono de navigacio. Dum pli ol du semajnoj, mi memoras, pluvis seninterrompe tage kaj nokte. La rivero superakvigis kaj elbordigis, kiel printempe...

Li rapide malplenigis sian jam malvarmigintan glason da teo, ektordis la lipharojn kaj daŭrigis:

— Jen unufoje nokte, kiam mia deĵorado estis finiĝanta, venis al mi deĵoranta vaporŝipano kaj raportis, ke la estro malsaniĝis kaj ordonis, ke mi anstataŭu lin ĝis la tagiĝo. Kiel intence, sur la rivero ekludis terura ventego, tia kian ankoraŭ neniam vidis niaj vaporŝipdirektistoj. Riskante ĉiuminute surteriĝi aŭ surpuŝiĝi je apudbordaj ŝtonoj, ni malrapidigis kuradon de la vaporŝipo kaj moviĝis antaŭen, kiel testudo. Antaŭ la tagiĝo la rivero iom kvietiĝis, sed ĝuste, ĵus ni venis en Prosi' on, tiel estas nomata tiu-ĉi plej kurbeca interspaco de la rivero, falis nebulego. Kion faris?... Mi ordonis ĵeti la ankojn. Tuj ni ĉiuj libere ekspiris kaj, antaŭĝuante neatenditan ripozon, jam starigis deĵorantojn, la nebulego malaperis. Kun ĉagreno mi devis ordoni levi la ankojn. Ordinare por plenumi tiun-ĉi ordonon estas bezonaj nur kvin-ses minutoj, sed je tiu-ĉi fojo unu levilo rompiĝis kaj dum oni levis la obstinan ankron pasis pli ol kvaronhoro kaj dum tiu ĉi tempo la vaporŝipo moviĝis hazarde, fortirata de tre rapida fluo. Ni ne havis ankoraŭ tempon por nin orienti meze de la senborda akvebenaĵo kaj ekmovigi la maŝinon, kiam nebulo ree kovris nin. Ni ree ĵetis la ankojn. Mi ordonis mezuri profundon ĉirkaŭe de la vaporŝipo, montriĝis, ke la fluo fortiris nin ien flanken for de la vaporŝipirvojo. Je tiu ĉi fojo ni longe atendis malaperon de la nebulo kaj preparolis nian situacion riskoplenan, kiu devis ankoraŭ plimalboniĝi dum ni levos la ankojn. Pasis pli ol unu horo en tia atendado. Fine, ekblovigis kontraŭa vento, kiu disblovis senpostsigne la nebulon kaj sur la ĉielo por unu momento eĉ eklumis afable la suno, preskaŭ tuj ree malaperinta post nubo. Ni delonge atendis tion ĉi kaj la ankoj estis levi-

taj tre rapide kaj jam sen ĉia malhelpo. La vaporŝipo ekmoviĝis antaŭen... Senĉese mezurante la profundon kaj neniel povante trovi la perditan irvojon, oni direktis la vaporŝipon laŭ mia komando hazarde jen dekstren, jen maldekstren, jen antaŭen, jen malantaŭen, ĉiunmomente riskante surteriĝi. Post duonhoro de vana serĉado min kaj miajn subulojn atakis malespero kaj la superstiĉa timo: ne povante sin orienti meze de la senlima akva spaco, aŭ eĉ trovi je iaj signoj proksimume la perditan direkton, ni jam volis venigi la vaporŝipestron, kiam la pordo de la direktilejo brue malfermiĝis kaj de ĝi aperis juna fraŭlino... Ŝi estis neordinare ĉarma en sia mallonga blua vestaĵo kun nebutonumita mallonga drapa ĵaketo super ĝi kaj modesta ĉapelo sur bela bukla hararango. Ŝi estis maldika, gracia, mezkreska kaj aspektis deksepjara knabino, sed en sia teniĝo, gestoj kaj kuraĝa rigardo estis la memfida fiereco kaj ordonemeco. Enirinte, ŝi silente etendis al mi la manon kaj, stariĝinte apud mi, fikse ekrigardis antaŭen, ĉagrene skuante la belan kapeton kaj kvazaŭ ion konsiderante. Kun miro rigardante la nekonatan ĉarmulinon kaj penante konjekti, kiu ŝi estas kaj kial ŝi aperis tiel neĝustatempe kaj neĝustaloke, mi jam intencis proponi al ŝi ian demandon, kiam ŝi gaje ekrigardis min kaj, ordigante per la maldekstra mano belan buklon, kiu ŝirmis subite ŝian okulon, etendis la dekstran antaŭen kaj diris mallaŭte: «Vi tro deflankiĝis!... Rigardu, tiuj ĉi arbetaĵoj super la akvo estas la supraĵoj de la arboj, kiuj kreskas sur la dekstra bordo de la rivero kontraŭ la promontoro Udaĉa... Tamen, por eviti ŝtonojn, kiuj kuŝas tie survoje al Udaĉa, ni devos direkti la vaporŝipon komence iom maldekstren...» kaj sin turninte al la vaporŝi pdirektistoj, ŝi subite ekkomandis per firma kaj laŭta voĉo: «Dekstren, dekstren!... «Kiam la direktistoj ankoraŭ demande rigardis jen min, jen la komandantinon, nenion povante kompreni, ŝi aliris al la direktiltrado kaj, per facila movo de la mano tute senĝene, senhezite forigis unu direktiston. Kun lerteco de multjara direktisto ŝi prenis per la ambaŭ manoj la radon kaj, fikse rigardante antaŭen, senhezite ekmovis ĝin jen tien, jen reen, akompanante ĉiun ekmovon per laŭta komandado: «Dekstren!... Ankoraŭ iom!... Nun iom maldekstren!... Plirapidigu la maŝinon!... Maldekstren, maldekstren!» Mi, ankaŭ la direktisto, povante ankoraŭ nek konsideri ion, nek rediri al la nekonatulino mistera, staris kiel ensorĉitaj kaj apenaŭ havis tempon ĝuste plenumi ŝian komandon. «Jen estas Udaĉa!... Ĉu vi rekonas ĝin nun?...» — ŝi diris al mi malice kaj ĉarme ridetante. «Jen ni tuj ĉirkaŭiros ĝin kaj alproksimiĝos al promontoro Rusalkin... kontraŭ kiu kuŝas la sennoma iusuleto... Ĉu tiel?» — ŝi demandis jam, kvazaŭ fanfaronante per sia kono de geografio de la rivero, la direktiston, kiu kun granda konfuzo kaj miro, responde al ŝi, jese balancis per la kapo, konstatante ĝustecon de ŝiaj vortoj. «Plej rapide antaŭen!... — ŝi ree ekkomandis. — Jen antaŭ ni estas ia vaporŝipo... nun vi estas ekster de ĉia danĝero...» Kaj, dirinte tion ĉi, ŝi jam volis forlasi la direktiltradon, kiam en la direktilejo eniris la vaporŝipestro. Li demande ekrigardis la fraŭlinon per severa rigardo kaj malĝentile, severtone ekkriis: «Fraŭlino, ŝajne, vi venis ne ĝustaloken!...» Mi volis defendi

nian savintonon kaj jam faris unu paŝon antaŭen al la estro, kiam ŝi, paliĝinte kaj malestime ekrigardinte lin de la piedoj ĝis la kapo, silente forlasis la radon kaj bruferminte post si la pordon, malaperis. Mi akompanis ŝin ĝis la pordo per entuziasma rigardo. Evidente ŝi eksentis ĝin, ĉar jam apud la pordo mem ŝi haltis kaj sendis al mi ĉarman rideton...

— Kiu ŝi estis? — mi demandis.

— Ĵus la vaporŝipestro anstataŭis min, — li daŭrigis post unu momento ne atentante mian demandon, — mi malsupreniĝis kaj malgraŭ terura laceco, kiun mi sentis en ĉiuj membroj, longe marŝis tra la vaporŝipo, serĉante la misteran fraŭlinon. Nenie renkontante ŝin, mi demandis pri ŝi la servantojn de la vaporŝipo kaj pasaĝerojn, sciigante al ili versignojn de ŝi, sed neniu vidis ŝin, ŝi kvazaŭ malaperis senpostsigne. Dum haltoj de la vaporŝipo mi plej atente observis ĉiujn forlasantaj ĝin, esperante almenaŭ tiam ekvidi ŝin, — ĉio estis vana... Kaj post unu tago, nokte, dum mia deĵorado, la vaporŝipo forbrulis pro kaŭzo neklarigebla... Neniu el pasaĝeroj aŭ vaporŝipanoj pereis, nur senpostsigne malaperis ĝia estro. Niaj direktistoj parolis, ke tio ĉi estis *ŝia* venĝo al la malĝentila vaporŝipestro!...

Li ree plenigis la glasojn kaj longe silentis, evitante mian rigardon.

— Ĉu vi neniam plu renkontis ŝin? — mi demandis post paŭzo, dum kiu li havis tempon tute trankviliĝi de sia emocio, elvokita de la rememoro.

— Printempe de la jaro sekvinta mi ricevis rangon de vaporŝipestro kaj jen tiun ĉi vaporŝipon, — li daŭrigis, profunde ekspirinte. — De tiam kaj ĝis hodiaŭ mi ĉiutage serĉas ŝin, plej atente observante ĉiun pasaĝerinion, mi ial firme kredas, ke mi ree vidos ŝin jam sur mia vaporŝipo, kie neniu kuraĝos ofendi ŝin... Multfoje dum tiu ĉi tempo mia koro batis malsaneme el la brusto, ĉar ofte mi renkontis fraŭlinojn, kiuj ĉe supraĵa observo ŝajnis similaj al ŝi je sia teniĝo, fiera kaj memfida irmaniero kaj vestaĵoj, sed ĉiufoje, ĉe pli atenta esploro de la nekonatulinaj, mi devis disreviĝi... Tamen antaŭ kvin jaroj mi renkontis ŝin vintre en la urbo, .. kaj ŝi tuj rekonis min! La renkontiĝo havis por mi tre gravajn rezultatojn!... Ordinare ni pasigas sur vaporŝipo proksimume sep monatojn dum jaro kaj tiu ĉi tempo pasas tre nerimarkeble, rapide dum senhalta, sufiĉe interesa kaj riĉa je ĉiutagaj impresoj vojaĝado tien kaj reen tra la rivero. Ĉiutage ja ni vidas novajn pasaĝerojn, novajn pejzaĝojn... Unuvorte la vivo kuras brue, gaje... Nu, tute alian ni sentas dum vintroj, kiam ni devas pasigadi en senageco ie en urbeto, kie travintras la vaporŝipo, longajn enuigajn tagojn de senlaboreco nekutima. Dum tiu vintro la vaporŝipo devis pasigi la vintron en unu novearangita haveno malproksime de urbo, de homoj. Mi treege enuis en la izoleco kaj senlaboreco. Por mallongigi la tempon ni ofte vizitadis en la vilaĝo, kuŝinta proksime de la haveno, restoracion. Kvankam ĝi estis malgranda kaj malpura, tamen — ĉiam plena de okazaj vizitantoj, plej ofte de vilaĝanoj, kaj bruplena... Alkutimiĝinte sur la vaporŝipo al ĉiama vivoplena bruado de pasaĝeroj, mi ŝatis en la restoracio ĝuste ĝian bruadon, kiu rememorigis al mi mian kutiman vivon someran. Ofte vizitante la restoracion,

mi baldaŭ konatiĝis kun la familio de la restoracimastro kaj en tiu ĉi simplanima familia rondo mi travivis multajn, se ne feliĉajn, do, almenaŭ, agrablajn minutojn en vigla babilado kaj senkulpa flirtado je du—fraŭlinoj filinoj de la mastro. Ili estis nek ĉarmaj, nek malĉarmaj, nek belaj, nek malbelaj, nek saĝaj, nek malsaĝaj... unuvorte, ili estis plej ordinaraj vilaĝaj knabinoj, kiuj tre ŝatis miajn oftajn vizitojn kaj, ŝajne, havis eĉ sekretan esperon almiliti mian koron... Unufoje, vizitinte la familion, mi estis surprizita, trovinte tie unu junan fraŭlinon, kiu de unua rigardo faris grandan impreson je mi. Ŝi estis instruistino, la parencino de la gemastroj, kaj devis gastigi tie kelkajn tagojn... Mi jam diris, ke ŝi tuj faris grandan impreson je mi, jes, tio ĉi estis ĝuste tiel, ĉar en ŝia aspekto kaj maniero de teniĝo estis io nekapteble simila al ŝi—al tiu mistera fraŭlino. Mi estis tridekjara viro kun bona ofico kaj ankaŭ bona salajro, penso pri arango de mia propra familia nesto jam ne unufoje antaŭ tiam venis en la kapon... post kelkaj tagoj mi decidis fari al ŝi edziĝoproponon. Ŝi loĝis ie malproksime en urbeto, kien oni devis veturi komence per veturilo ĝis la urbo proksima kaj de tie jam per fervojo. Tiun ĉi vojon malproksiman mi bone ellernis dum tiu vintro, ĉar kvin aŭ ses fojojn mi vizitis «la fianĉinon.» Mi sentis nek amon nevenkeblan al ŝi, nek simpatian pasian, kio okazas ofte en tiaj aferoj, tamen en ŝia simileco al tiu fraŭlino treege logis min. Dum unu vizito al ŝia hejmo mi faris al ŝi edziĝoproponon kaj ricevis konsenton. Ni interkonsentis ree intervidiĝi en komenco de februaro kaj fianĉiĝi por printempe, tuj post Pasko, antaŭ navigacio mem, geedziĝi... En februaro, kiel mi promesis al ŝi, mi entreprenis mian vojaĝon al ŝi. Trio da bonegaj ĉevaloj rapidege alveturigis min en nian urbon; de tie mi jam devis veturi pluen fervoje. Mi faris en la urbo necesajn aĉetaĵojn, mi min provizis je donacoj por la fianĉino kaj en plej bona humoro venis la stacidomon. Nur kelkajn minutojn mi devis pasigi tie, atendante la vagonaron. Starante apud la biletkaso kaj atendante mian alternon inter multenombra bruanta popolamaso, mi subite ekvidis ŝin... tiun misteran fraŭlinon, kiun mi serĉis delonge. Kvankam ŝi estis nun jam ne knabino, kia ŝi estis tiam, antaŭ kelkaj jaroj, sed plene matura fraŭlino, kvankam ŝi nun estis vintre-vestita, mi tuj rekonis ŝin. Estis la samaj teniĝo, gestoj, irmaniero kaj kuraĝa rigardo de iom memfidaj kaj fieraj ĉarmaj okuloj... Jus niaj okuloj renkontiĝis, ŝi afable ekridetis al mi de malproksime kaj, gaje balancante per la kapo, alproksimiĝis al mi... ŝi ankaŭ rekonis min! «Ĉu vi veturis tien?...» — ŝi demandis, etendante al mi la dekstran manon kaj per la maldekstra ordigante sian belan bukleton, kiu falis de la frunto kaj ŝirmis ŝiajn okulojn. — «Ĉu vi veturos... al via Marinjo?...» — ŝi daŭrigis, amike premante mian manon kaj fikse rigardante min. — «Res-tu! Ŝanĝu vian intencon!...» — La lastaj vortoj estis diritaj per tia ordonema tono, ke mi tuj sen ĉia bedaŭro kaj hezitado, eĉ ne demandante ŝin pri kaŭzo de tia konsilo neatendita, decidis sekvi ĝin kaj kliniĝis por preni mian valizon, kuŝintan apud miaj piedoj, kaj sekvi kien ajn post la enigmoplana, mistera ĉarmulino... Sed kiam mi rektiĝis, tenante la valizon en la mano, ŝi

jam forestis. Mirigita mi longe serĉis ŝin per la okuloj, sed ŝi nenie estis vidata. Mi serĉante ŝin, marŝis senĉese laŭlonge kaj laŭlarĝe de la stacidomo, atente pririgardis, ŝajne, ĉiun virinon, estintan tie... ŝi ne estis. Mi revenis hejmen kun la koro premegita, povante nek eĉ por unu minuto forgesi ŝiajn ĉarmajn vizaĝotrajtojn, nek kompreni ŝian tiom enigmoplanan averton. Dum kelkaj tagoj mi nenien eliris el la ĉambro kaj kiam mi, fine, vizitis la familion de la restoracimastro, oni gratulis min, estante tute certaj pri tio, ke mi fianĉiĝis kun Marinjo. Kiam mi rakontis pri mia subita ŝanĝo de la intenco, kompreneble, prisilentinte la renkontiĝon kun ŝi, oni ĉirkaŭis min kaj kun ne kaŝata ĝojo sciigis min, ke Marinjo estas ftizulino, ke ŝi vivos ne longe, ke ŝiaj gepatroj, ankaŭ geavoj estis mortintaj en juna aĝo ankaŭ pro ftizo, ke oni bedaŭris min, kiam mi intencis edziĝi je ŝi, sed ne kuraĝis rompi mian «feliĉon...»

La vaporŝipo ellasis laŭtan daŭran fajton. La vaporŝipestro metis sur la kapon sian ĉapon kaj leviĝis. La vaporŝipo alproksimiĝis al ia alboardiĝejo, kie li devis anstataŭi sian helpanton.

— Poste mi sciigis, ke ŝi efektive mortis pro ftizo dum tiu sama printempo... — li daŭrigis, ŝlosante sian kajuton. — Mi ĝis nun restas fraŭlo kaj, kiel antaŭe, ĉiutage esperas ree renkonti tiun fraŭlinon... Ial mi supozas, ke mi nepre renkontos ŝin kaj je tiu ĉi fojo jam por ne disiĝi kun ŝi plu... Mi firme kredas, ke ŝi... estos mia edzino, — li aldonis jam flustre, premante mian manon.

La vaporŝipo alboardiĝis kaj mi longe observis la vaporŝipestron, kiu staris sur rando mem de sia komandponto sur la supra ferdeko kaj fikse rigardis fraŭlinojn jen forlasantajn la vaporŝipon, jen enirantajn, esperante renkonti inter ili la misteran fraŭlinon.

Ĉu li renkontos?

I. ŜIRJAEV

Premiita en la XIaj. Floraj Ludoj



Pro... kaj Por...

Pastro Font i Giralt, laŭ «Espero Katolika», kies redaktoro Pastro Ramboux, kun «akraj trajtoj», kredas (kredo estas ja pli facila ol scio) ke la Floraj Ludoj utilas «NUR» al verkado de malĉastaj literaturajoj, diras pri nia amiko kaj kunfederaciano: «Enkarnigita saneco, dika negranda, triontempe ridegante, triontempe preĝante, duontempe laborante, resttempe dormante, parolante Esperanton kiel gepatran lingvon, kontraŭo de pesimisto, scienca homo: Pastro Font i Giralt». — Ni dankas por la justa laŭdo al nia samlingvano, kaj responde al pastro Ramboux, al liaj «akraj trajtoj», ni demandas al li kial li ne verkis por premioj kaj temoj de katolikaj episkopoj en la Floraj Ludoj. Kaj ni maldankas lin en la nomo de la katolikaj verkistoj kiuj estas premiitaj en Floraj Ludoj.

Aŭtoritata opinio

Internacia lingvo rompos ĉiujn barojn de la skeptikaj registaroj, ne ĉar ĝi estas perfekta — tia ĉiam relativa perfekteco ilin tre malmulte interesas, — sed ĉar ĝi estas *praktika*, ĝenerale *uzata* kaj tre *disvastigita*.

Nia Esperanto pruvis *praktike* sian taŭgecon, sian plenan uzeblecon kaj jam estas *ĝenerale uzata*; nia devo estas sekve ĝin propagandi energie tian, kia ĝi estas, pliriĉigante ĝin laŭ la postuloj de la vivo.

Oni respondos: «Kelkaj reformoj, reformetoj helpos al ĝia disvastigado!»

Bedaŭrinde la plibonigistoj ne akordiĝas pri tiuj ĉi reformoj; kelkaj — precipe la uzantoj de latindevenaj lingvoj — opinias, ke bona estus lo forigo de la supersignitaj literoj, sed aliaj — precipe la Slavoj — opinias, ke grava eraro estus tia forigo; al kelkaj malplaĉas la finaĵoj: *oj, aj*, aliaj kontraŭe certigas, ke ili, dank' al sia «fluebleco,» tre faciligas la elparolon de Esperanto; kelkaj malŝatas la akuzatívon, kies utileco estas evidenta al aliaj, ĉar sub ŝajna komplikado ĝi forigas de la internacia lingvo multajn malfacilajn regulojn pri la konstruo de la frazoj, ktp.

Nenia aŭtoritato en Esperantujo havas la povon altrudi al la Esperantistaro tiajn reformojn: Enkonduki unu aŭ alian, eĉ malplej gravajn, estus fatale naski skismon, rompi nian ĉefan forton: nian unuecon.

Ĉiuj, eĉ niaj kontraŭuloj, devus kompreni, ke dank' al sia multjara uzado, dank' al sia jam ĝenerala disvastiĝado, nia Esperanto *sola* estas kapabla montri al ĉiuj la eblecon de internacia lingvaĵo, ke sekve, eĉ tiuj, kiuj proponas aliajn sistemojn, saĝe agus — por ke venku ia ajn internacia lingvo — batali de nun apud ni por Esperanto.

Poste?... Nu, ni relegu la antaŭparolon de nia Fundamento: «Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la *registaroj* de la ĉefaj regnoj... tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton... fari en la fundamento de la lingvo... ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, *se* tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj; sed *ĝis tiu tempo...*» ni konservu severe nian Zamenhofan Esperanton!

TH. CART

Prez. de la Akademio



Pro... kaj Por...

Pro malsaniĝo de nia kara profesoro Domènech, la radian kurson de Esperanto en Radio-Barcelona daŭrigis nia amiko Dro. Bartomeu.—Ni treege deziras plej baldaŭan resaniĝon de nia samideano Domènech.

XII^{aj} Internaciaj Esperantistaj Floraj Ludoj

(Sekvo de premioj kaj temoj)

VIII. — Premio de la Registara Urbestro de Sta. Coloma de Farnés: 100 ptoj. Temo: Versaĵo aŭ prozaĵo plej bone kantanta la naciajn globojn.

IX. — Premio de S-ro. Ramon Masgrau, Registara Delegito de Sta. Coloma de Farnés: 25 ptoj. Temo: Patrujama.

X. — Premio de S-ro. Parolĥestro de Sta Coloma de Farnés: 25 ptoj. Temo: La malmoraleco ĉe la virina vesto.

XI. — Premio de ĵurnalo «La Veu de la Selva» de Sta. Coloma de Farnés: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XII. — Premio de la firmo «Grafikaj Artoj» de Sta. Coloma de Farnés: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XIII. — Premio de «Granda Hotelo» de Sta Coloma de Farnés: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XIV. — Premio de «Centra Hotelo» de Sta. Coloma de Farnés: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XV. — Premio de pastro Josep Puig de Sta. Coloma de Farnés: 1 sterlinga funto. Temo: Plej bona verko priskribanta la kastelon, ermitejon, turon Planes, ktp. de Farnés.

XVI. — Premio de Banloko «Orion» de Sta Coloma de Farnés: 100 ptoj. Temo: Graveco de la fizikaj kvalitoj de la akvoj akrato-termaj, radiaktivaj, rilate al la aktivecoj kaj efikoj de tiaj akvoj, speciale koncernante la fiziologian kaj terapeŭtikan efikon.

XVII. — Premio de D-ro. Manuel Burch, posedanto kaj direktoro de Banloko «Orion» de Sta. Coloma de Farnés, 50 ptoj. Temo: Laŭvola.

XVIII. — Premio de S-ro. Josep M.^a Iglesias de Sta. Coloma de Farnés: 50 ptoj. Temo: Plej bona traduko de versaĵo de la fama kataluna poeto Joan Maragall.

XIX. — Premio de Hora Societo de Sta. Coloma de Farnés: 50 ptoj. Temo: Pritraktanta la muzikverkadon kaj ĥorkreadon de la el la pasinta XIX^a jarcento kataluna muzikverkisto Clavé.

XX. — Premio de S-ro Josep Callís de Sta. Coloma de Farnés: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XXI. — Premio de S-ro. Josep Corominas de Sta. Coloma de Farnés. 25 ptoj. Temo: Laŭvola,

XXII. — Premio de Ekscelenca S-ro. Joan Ventosa i Calvell, eksministro kaj lasta parlamenta deputito de Sta. Coloma de Farnés: 50 ptoj. Temo: Laŭvola.

XXIII. — Premio de la grupo «Paco kaj Amo» de Barcelona: 25 ptoj. Temo: Pri paco kaj amo.

XXIV. — Premio de la grupo «Ĝerona Espero» de Girona: 50 ptoj. Temo: Esperanto kaj Radiofonio.

XXV. — Premio de S-ro. Ivan H. Krestanoff, de Pirdop (Bulgarujo): Plena kolekto de lia verkaro valoranta proksimume 25 ptojn. Temo:

XXVI. — Premio de S-ro. Narcís Massagué, provinca registara deputito, de Sta. Coloma de Farnés: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XXVII. — Premio de la grupo «Lumon» de Terrassa: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XXVIII. — Premio de «Agrikultura Sindikato» de Sta. Coloma de Farnés: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XXIX. — Premio de D-ro Ramon Torres i Carreres de Barcelona: 100 ptoj. Temo: Originala aŭ tradukita scienca studo pri la eltrovo de la radioj X. (Roentgenologio).

XXX. — Premio de D-ro Sennomulo: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XXXI. — Premio de S-ro Esteve Rossell de Barcelona: 25 ptoj. Temo: Kio estas kaj kiel efikas la spiritaĵoj de Sankta Ignaco de Loyola, kaj la koncerna gvidado de Pastro Vallet de Katalunujo.

LISTO DE VERKOJ RICEVITAJ

1. Vivanta strofo. — 2. Un sonnet sans défaut vaut seul un long poème... — 3. I aquelles grâces en son rostre juntas, cerco disperses per tants rostres d'altres! — 4. Manta sens me mal razona quar ieu non chant plus soven... — 5. Sonetoj kaj madrigaloj. — 6. Amiko fidela, trezoro plej bela. — 7. (sama devizo) (unua verso: En valo ĉe simplaj modestaj knabinoj. — 8. Zamenhof. — 9. Paco, Amo kaj Esperanto. — 10. Progreso. — 11. Kion oni volas, tion oni povas. — 12. Antaŭen! — 13. Patrino Amo.



Pro... kaj Por...

Interŝanĝo de originaloj. — Dum la Ĝeneva Kongreso, ni interparoladis kun niaj amikoj kolegoj F. Schoofs kaj Hromada pri la konveno ke la katalunoj sendu elkatalunajn originalojn al «Belga Esperantisto», 11, Hondstraet, Antwerpen (Belgujo) kaj al «La Progreso», Socharská 333, Praha VII (Ĉeĥoslovakio) obee al tio kela esperantistoj povu legi en Esperanto literaturaĵojn malfacile atingeblajn en la propra lingvo. Lastatempe «Amerika Esperantisto», 507 Pierce Building Copley Square, Boston 17, Mass (U. S. A.), skribe ankaŭ faris al ni tiun peton. La katalunaj verkistoj estas do petataj sendi al tiuj gazetoj plej bonajn elkatalunajn verkaĵojn. — Feliĉe *Kataluna Esperantisto*, pro sia organeco de la Internaciaj Floraj Ludoj de ni ĉiujare organizitaj povas ĉiam elĉiunaciajn verkaĵojn publikigi, kaj laŭeble helpo al la logika peto de niaj kolegoj direktantaj tiujn ŝatindajn gazetojn.

«*Esperanta Ĵurnalista Servo*. — Sidejo: Warszawa (Varsovio), Leszno 28/13. — Ni sciigas ĉi-pere la tutmondan esperantistaron, ke ni ĵus fondis en ĉefurbo de Pollando, Warszawa, institucion «Esperanta Ĵurnalista Servo» kies celo estas meti Esperanton al la servo de diverslingva gazetaro per konstanta liverado al ĝi de ĉiuspecaj presotaĵoj, ricevotaj de niaj esperantaj kunlaborantoj (precipe ekstereŭropanoj.) La ĉiam bezonataj por ni presotaĵoj estas jenaj. 1. *Aktualaj sciigoj*, raportoj kaj artikoloj pri la socia, ekonomia kaj politika vivo. 2. *Aktualaj fotografaĵoj* pri la diversaj okazintaĵoj (katastrofoj, konferencoj ktp.) (*Rimarko*: Ne ilustraĵoj, laŭ kiuj preskaŭ neeble estas fari bonajn preskliŝojn.) — 3. Interesaj priskriboj kaj artikoloj pri la kulturo, civilizacio, moroj, spiritaj movadoj, teatraj okazintaĵoj ktp. 4. Tradukoj de plej valoraj noveloj, rakontoj kaj ankaŭ priskriboj pri bela literaturo kaj arto. Ĉiuj ĉi supre cititaj presotaĵoj estos de ni laŭdezure pagataj aŭ interŝanĝataj per similaj de nia lando. — Ni atentigas, ke ni havas nenion komunan kun neseriozaj korespondemuloj sed, stariginte nian entreprenon sur firma financa bazo, ni volas fari el Esperanto potenca ilon de gazetara servo. — Pri la seriozezo de nia entrepreno povas certigi ĉiujn la fakto, ke nin apogas D-ro *Leono Zamenhof*. — *Ĵurnalistoj, fotografistoj kaj seriozaj korespondantoj* tuj ekkomencu kunlabori kun ni. *La Gvidantaro de Esperanta Ĵurnalista Servo*, Leszno 28/13, Warszawa, Pollando».

«*Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado*—12 Bd. du Théâtre, Genève. — Gazeta statistiko. — La viglecon de la propagando en monato oktobro pruvas la gazetartikoloj, alvenintaj ĉe ni. — Ni ricevis en lingvoj: angla 43, germana (Svislando) 79, germana (Germ., Aŭstrio, Ĉeĥosl.) 21, franca (Svislando) 90, franca (Franc. kaj Belg.) 12, hispana 19, holanda 2, itala 4, kataluna 2, pola 1, rusa 1, sveda 1. Entute 275 eltranĉaĵojn en 10 lingvoj. Ni petas ĉiujn propagandistojn regule sendi al ni eltranĉaĵojn aŭ gazetojn, signante la koncernan artikolon per ruĝa krajono».

Jarlibro 1926. — Ni atentigas, ke korektoj, aldonoj, novaj tekstoj por la jarlibro 1926 devas atingi la Centran Oficejon ĝis 15 decembro 1925. Ekstereŭropanoj volu ne prokrasti tujan sendon de tiaj informoj post ricevo de la Oficiala Bulteno aŭ de la nuna gazeto. Adreso: 12 Bd. du Théâtre, Genève.

Novaj Kursoj estas organizitaj ĉe niaj viglaj societoj «*Barcelona Stelo*» kaj «*Nova Sento*». Sukceso premias ties taskon.

Esperantista Klubo Palma. — Novaj kursoj estas komencitaj tre sukcese ĉe niaj karaj tieaj samideanoj, gvidataj de nia kompetenta pioniro S-ro N. Bofill.

Organizita de «Paco kaj Amo» festo por la datreveno de Esperanto, sukcesegis. Partoprenis ĝin pli ol 200 personoj, cifero atingita ankoraŭ en neniu el la datrevenoj organizitaj antaŭe ĉe ni. — Rimarkindaj estis la paroladoj de kunsocietanoj Roig kaj Dalmau, ĉar malgraŭ ke unu ne aŭdis la alian

pri siaj temoj, ili klarigis la internan ideon per la samaj argumentoj. Ĉi tio pravas ke tiu societo estas bone saturita de tiu sento kiu vivigas Esperanton.

La Esperanta Societo en Barcelono «Paco kaj Amo» bele festis la malfermon de unuagrada kurso kies gvidon zorgas Ludoviko Domènech. La festo konsistis el du katalunaj komedioj: deklamado de esperantistaj versaĵoj, parolado de Kdo. S. Roig pri la «Celo de la Esperantistoj,» kaj Fino. Palmira Castellví kiel kutime bone kantis en la Zamenhofa lingvo «La edziĝo de Figaro,» «Via rido,» «La vojo,» ktp. La salono kie okazis tiu alloga festo estas bela kaj la aspekto estis impona pro la grandnombro da ĉeestantoj. Dank' al tiu sukcesa festo la kurso tre estas ĉeestata kaj tiu antikva societo plivigliĝas.

«*Paris: la 28an de Novembro 1925.* — Tre estimata Sinjoro (-ino). — Ni havas la plezuron sciigi al vi ke A. I. L. E. (Alliance Internationale pour les Libres Echanges — Internacia Unuiĝo por Liberaĵ Intersanĝoj) antaŭ ne longe adoptis Esperanton kiel Universalan helplingvon. — Tiu-ĉi decido estas alprenita post tre vasta enketo kiun A. I. L. E. publikigis en la monato Septembro de l' unua jaro kaj pri kiu la granda gazetaro prialudis. — Konsekvence, A. I. L. E. jam de nun estos la defendanto de Esperanto en ĉiuj rondoĵ penetrataj de sia Organo «La Revue de l'Univers»; ĝia agado iĝos plej efika, okazigante la praktikan uzadon de Esperanto inter ĝiaj Membroj. Ĝia organizo plene favoras por tia celo, tial ke A. I. L. E. nuntempe arigas, cele de internacia kunlaborado, proksimume 2.000 Membrojn-kolektantojn, serĉantojn, intelektulojn - kiuj apartenas al 134 landoj. — Tiuj Membroj estas grupigitaj laŭ 8 specialaj fakoj kaj iliaj nomoj, adresoj kaj deziroj pri intersanĝo estas publikigataj sesfoje ĉiujare per la «Revue de l'Univers» kiun ĉiu el ili senpage ricevas. Tiurimede, ili kapablas intersanĝi ideojn, sciigojn, kolektotaĵojn kaj ĉiujn aliajn utilajn servojn. — Esperanto do renkontas en nia Asocio medion en kiu ĝi rapide disvastiĝos per si mem, kondiĉe ke oni, de nun, enigu en tiun-ĉi medion esperantistan spiriton — Pro tio, A. I. L. E. petas al la kunlaborado de 100 Delegitoj elektitaj inter la plej konataj de U. E. A., per senpaga enskribo dum unu jaro en sia fako D (Internacia Korespondado). — Tiel rekompencante amikajn rilatojn jam starigitajn inter A. I. L. E. kaj U. E. A., tiu reciproka kunlaborado de du gravaj Asocioj plej ege helpas al triumfo de Esperanto. — Vi estas, tre estimata Sinjoro (-ino), unu el la 100 Delegitoj al kiuj ni nin turnas por doni la esperantistan antaŭenpuŝon al nia Unuiĝo. Ni estos tre feliĉaj se vi bonvolos, ĉirkaŭ vi, ageme propagandi por nia Asocio kaj por ĝia celo: la Internacia Kooperado. Ni sendos al vi la provizon da propagandiloj en Esperanto kiun vi men mendas al ni; kaj baldaŭ, dank' al vi, Esperanto, apogante sin sur nia universala organizo, iĝos la kutima interkomprenigilo inter ĉiurasaj kolektantoj kaj serĉantoj. — Por rekompenci viajn elspezojn kaj klopodojn, A. I. L. E. konsentos al vi propagandan kompenson kies minu-

mumo estos 5 francaj frankoj po ĉiu nova Membro kiu aliĝos al A. I. L. E. per via perado. — Ni sincere antaŭdankas al vi kaj restas — Plej samideane Via, = La Administra Konsilantaro — Robert GAFFIOT, — Prezidanto» — Adreso de tiuj gravaj Unuiĝo kaj Revuo estas: Boîte Postale 49, Paris. — Ni sincere gratulas la Parizajn samideanojn, por tiu nova progreso de Esperanto, kaj rekomendas al niaj legantoj tiujn Unuiĝon kaj Revuon.



Bibliografio

(Ni recenzos verkojn duope ricevitajn)

HEBREA PROGRESO EN PALESTINO. Eldonita okaze de la XIV-a. Cionista Kongreso en Wien de la Centra Cionista Organizacio. 25 × 15, 15 paĝoj. Senpage havebla de la Centra Cionista Organizacio, London, W. C. 1, 77 Gt. Russel Street.

Jen tre interesa kaj per 16 bildoj bele ilustrita broŝuro, kiun la Centra Cionista Organizacio oficiale eldonis, por informi la esperantistaron pri la ĝisnunaj progresoj kaj sukcesoj de l' Cionista koloniza kulturlaboro en Palestino. Ĝi donas unue en ĝeneralaj trajtoj la historion de la Cionista movado, priparolas la jur-politikan bazon de la Cionismo, t. e. la Balfouran Deklaracion kaj priskribas la organizaĵojn per kiuj efektivigas la rekonstruo de la Hebrea lando. La broŝuro, verkita en bona Esperanto-stilo kaj kun malmultaj preseraroj, de D-ro. Imanuel Olšvanger, delegito de la Cionista Organizacio en Suda Afriko, kaj prezentita al la XVII-a Tutmonda Kongreso de Esperanto en Genève, estas laŭdinda tasko por la rekonstruo de la detruita hebrea popolo.

PSIKANALIZO KAJ EDUKADO, de Pierre Bovet, direktoro de Instituto J. J. Rousseau. Tradukita de rondeto de edukistoj okaze de la unua esperanta Somera Universitato. Genève, 1925. 37 paĝoj, 21 1/2 × 16. Prezo: ne montita.

El tri ĉapitroj konsistas la scienca verketo: I Kio estas psikanalizo, II La psikanaliza metodo kaj ĝiaj procedoj, III La analiza psikologio kaj ĝiaj aplikoj en edukado.

Ĉiu ĉapitro, korekte tradukita, estas valora kaj grava paŝo en la mondo de l' plej grandaj misteroj. La studo de la subkonscio, la esploro de tiel multaj fenomenoj, pri kies deveno ni preskaŭ neniam atentis, estas kulturata de tiel malmultaj homoj, ke la verko certe vekos intereson ĉe la esperantistoj kaj estos efika kontribuo al la diskonigo de psikologio.

Kiom povas helpi psikanalizo en edukado la legantoj povos trovi en la nomita verko, kiun ni varme rekomendas al ĉiuj, precipe al edukistoj.

NOVELOJ de Henryk Sienkiewicz, el pola lingvo tradukis Lidja Zamen-

hof. XVI volumo de Internacia Mondliteraturo, ŝatinda kolekto eldonita de Ferdinand Hirt & Soh, Leipzig, 1925. 64 paĝoj, $19\frac{1}{2} \times 13$. Prezo: 1.60 Rm.

Certe tiu ĉi nova volumo de Internacia Mondliteraturo superas multajn el la antaŭe aperintaj, ne nur pro la beleco de la enhavataj kvin rakontoj sed ankaŭ pro la flueco de stilo de la tradukintino. Sienkiewicz, la mondkonata aŭtoro de *Quo vadis*, donas tian vivon kaj animon al siaj paĝoj, ke ĉiam oni legas lin kun granda plezuro.

La elektitaj rakontoj estas belegaj. Oni malfacile povus diri kiu el ili estas la plej ŝatinda. Sen preseraroj, gramatike korekta, le nova libro tiel zorge eldonita el Eldonejo Hirt, meritas lokon en la biblioteko de ĉiu esperantisto.

ELEMENTOS DE ESPERANTO. Gramatiko por hispanlingvanoj, verkita de Fernando Soler Valls. Valencio, 1925. 32 paĝoj, 16×11 . Prezo: 0.25 pt.

La aŭtoro celas per tiu ĉi gramatiketo helpi la disvastigon de nia afero. La enhavo estas korekta kaj simpla: taŭga por la celo de la verkinto.

VI SOLA, ESPERANTO, POVAS FARI TIAJN MIRAKLOJN. Unuakta originala teatraĵo de Arturo Ghez, premiita ĉe la X Internaciaj Floraj Ludoj. Eldonita de A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italujo) 1924. 40 paĝoj, 12×8 . Prezo: 1.50 liroj.

Tre sprita komedieto, facile ludebla ĉe esperantaj festoj. Dank' al Esperanto du fuŝistoj, pentristo kaj muzikisto, trovas riĉecon. Amerika milionulo savas la du mizerulojn kaj la ceterajn rolulojn.

Se ni esceptas tri aŭ kvar gramatikajn erarojn, ni povas diri ke la aŭtoro sukcesis doni al ni belan kaj amuzan teatraĵon.

POSTMORTA VIVO. Fragmento el la Spirita Mondo de Wanisaburo Deguti, el la japana lingvo tradukita de Tadakacu Juri. Eldonejo Oomoto, Ajabe, Kioto-fu, Japanujo, 1924. 12 paĝoj, $18\frac{1}{2} \times 13$. Prezo: ne montrita.

Oomoto, la nova spirita movado en Japanujo, vekis intereson ĉe diversaj esperantistaj medioj kaj pro tio la tradukinto volis doni al ni ian instruon pri la stato de la animo trans la morto.

La elektita fragmento priskribas kie kunvenas la spiritoj post la morto de la korpo, kien ili iras post la restado en la Intera Regiono, k. t. p.

Eble la legado de la verketo estas interesa kaj instrua, sed mi nenie trovis intereson nek instruon. Ĉio ŝajnas al mi rakonto por malsprituloj, se mi sincere devas diri mian opinion.

La teksto estas sufiĉe korekta kaj facila.

EN LA MONDON VENIS NOVA SENTO, Poemeto kun aldono de kelkaj katolikaj poezioj kaj psalmo de F. Pizi. Eldonejo A. Paolet, S. Vito al Tagliamento, 1925, 24 paĝoj, 22×15 . Prezo: 2 liroj.

La poemo enhavas kelkajn originalajn pensojn. La ceteraj poezioj meritas ankaŭ laŭdon, se oni juĝas ilin el lingva vidpunkto.

Zorge presita, la libreto fariĝas interesa, precipe por katolikoj.

ESPERANTA LEGOLIBRO. Originale verkita de B. kaj E. Migliorini. Eldonejo de A. Paolet, S. Vito al Tagliamento, 1925. 144 paĝoj, 16½ × 12. Prezo: 5 liroj.

La verko konsistas el tri partoj: I Tra la vivo. II Tra la lingvo. III Tra la literaturo. La aŭtoro ĉerpis la tutan enhavon de la libro el gazetoj kaj zorge ordigis ilin por doni al niaj lernantoj malkaran kaj ŝatindan legolibron.

Sur paĝo 11 «antaŭ fermi» kaj «post esti» estas forigindaj. — SALJO.

Nova Granda Libro en Esperanto. — Estas jam tute presita la «Kataluna Antologio,» aperinta je la fino de Novembro. Tiu ĉi granda verko enhavas elektitajn pecojn de katalunaj poetoj kaj prozistoj, antikvaj kaj modernaj. Ĝi estas presita sur linpapero (la tuta eldono estas «bibliofila») kaj okupas pli ol 400 paĝojn kun formato 22 x 16 cm. La versaj kaj prozaj tradukoj estas faritaj de lertaj katalunaj esperantistoj sub la gvido de Jaume Grau Casas, kompilinto de la «Antologio.» Ĝia stilo estas plene fundamenta. Krom la tradukitaj literaturajoj estas en la libro noto bibliografia pri ĉiu aŭtoro, kelkaj popolkantoj verse tradukitaj kun la melodioj, kaj studo pri la katalunaj lingvo kaj literaturo. En tiu ĉi studo estas speciale pritraktataj la verkoj de la famaj mezepokaj trobadoroj, ĉu provencaj, ĉu katalunaj. Estas ankaŭ rimarkindaj kelkaj komparoj de la kataluna lingvo kun la hispana, la franca kaj la itala. La «Kataluna Antologio» kostas, afrankite, por ĉiuj landoj, escepte tiujn de la Iberia duoninsulo: du dolarojn, dekunu svisajn frankojn, naŭ ŝilingojn. En la Iberia duoninsulo ĝi kostas 13 pesetojn. Ĉiu ekzemplero (kiu estas solide bindita kaj pezas unu kilogramon) estos sendata en rekomendita pakajo. Petu informojn de «Komitato por Kataluna Antologio:» S-ro Eduard Capdevila, kasisto, str. Carders, 29 Barcelona.

Nekrologo

Nia aragona malnova amiko, fervora agema samideano, Emilio Gastón Ugarte, Vicdelegito de U. E. A. en Zaragoza, kie li profesie estis inteligenta advokato, kaj politika aŭtoritatulo, forlasis nian mondon. Tiu malĝojiga sciigo, kiun ni ricevas de nia samideano Valentí Alavedra el Terrassa, vere ĉagrenas nin, la katalunlingvan samideanaron, ĉar S-ro. Gastón estis unu el la malmultegaj hispanlingvaj samideanoj, kiu efektive konis nian Federacion, niajn kongresojn kaj ceteraĵojn, kaj ilin komprenis kaj estimis. Certe la aragonaj samideanoj, pranepoj el reĝoj de la estinta Katalun-Aragona Konfederacio, pli facile komprenas nin. Lia samurbano kaj kumbatalanto, advokato ankaŭ, Manuel Maynar, Delegito de U. E. A. en Zaragoza, same estimas kaj komprenas nin. Kiel tiu-ĉi, Emilio Gastón estis Honora Membro de K. E. F. Lastatempe ni vidis elokventajn pruvojn de esperanta fervoro kaj oferemo de nia ĵus formortinta amiko. Lia malapero estas tre bedaŭrinda perdo por nia movado. Al lia familio ni esprimas plej sinceran kondolencon, kaj esperas fortecon elporti tian malfeliĉon.

Intershangho — Gazetoj ricevitaj

Heroldo de Esperanto. Horrem bei Köln, Germanlando.

La Revuo Orienta, Japana Esperanta Instituto, Tokio, Uŝigome, Ŝin Ogaŭamaĉi III-14.

Amikeco, Internacia Esperantista Klubo, Koblenz am Rhein, Eltzerhofstr. 5. (Germ.)

The British Esperantist. British Esperanto Association, 17, Hart Street, London W. C. 1.

La Kolportisto, Dumonata — Senpaga. — Esperanta Kolportista Asocio. 64, St. Thomas Road, London, North, 4.

Literaturo, Brita Esperantista Asocio, 17, Hart Street, London, W. C. 1. (ne plu aperos).

Bulteno, Antverpena Por-Esperanto Propaganda Komitato, Sniedersstraat, 51.

La Progreso, Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, Praha VII. Socharská. 333.

Espero Katolika, Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, F-ino M. Larroche, 55 Rue de Vaugirard, Paris (6.)

Marto, Oficiala organo de Germana Esperanto-Ligo en Ĉeĥoslovakujo. Haida — (Bohemujo).

Informoj, Esperanto-Asocio de Estonio. Tallinn, postkast 6.

Agrupación Escultista, Carrer Argentona, 3 i 5, Barcelona (Gràcia).

Katolika Mondo, Universala Organo por tutmondaj interesoj Katolikaj — Zug, Svislando.

Esperanto, Ploesti, Placo Unirei n.º 24, Rumanujo.

Espero Teozofia, Organo de Teozofia Esperanta Ligo. Krakovská 17, Praha II, Ĉeĥoslovakujo.

Belga Esperantisto, Oficiala Organo de la Belga Ligo Esperantista, Kleine Hondstraat, 11. Antverpeno.

(daŭrigota)

Jam aperis
Kataluna Antologio

kompilita de
Jaume Grau Casàs

416 paĝoj 22 × 16

Ĉiu kataluno nepre devas aĉeti
kaj diskonigi la plej grandan ver-
kon de 1925

Vidu detalojn sur paĝo 268.

Angel Valdepeñas

Sastre - Tajloro

Pelayo, 6, pral

BARCELONA

Vestits i abrics de tota mena a mi-
da per a home, des de 130 ptes.,
a 175 ptes. els de millor qualitat.

Bon tracte

Bon treball

ESPERANTO UZATA

Pelayo, 6, pral.

BARCELONA

Nota. Als esperantistes, 10 per cent de
descompte.

"Kataluna Esperantisto"

ĈIUMONATA 16-PAĜA GAZETO
OFICIALA ORGANO

DE LA

Internaciaj Floraj Ludoj

Plej bonaj verkaĵoj de plej bonaj
aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono: 6 svisaj frankoj aŭ 1'50 usonaj
dolaroj aŭ egalvaloro efektivebla en
Barcelona.

Adr.: Carrer València, 245-BARCELONA

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos repressi nian anon-
con, rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi
tekston publikigotan.

ATENTU ESPERANTISTOJ!

Se vi deziras nur por 2.50 svisaj
fr. aŭ egalvaloro, konatiĝi kun la
vivo, moroj, kulturo, literaturo k.
t. p. de la bulgara popolo,

ABONU LA GAZETON

Bulgara Esperantisto

kiu dum sia 7.^a jaro donos dekdu
16 - paĝajn numerojn nur en
'esperanto.

ELEKTITAJN ORIGINALAJN KAJ
TRADUKITAJN VEI KOJN

vi legos en «Bulgara Esperantisto»
nur kontraŭ 2.50 sv. fr. jare.

Ĉion adresu: BULGARA ESPERANTISTO
str. Car Boris, 69 - Sofio (Bulgario)